ESPERANTOLOGIO
ESPERANTO STUDIES

EES

Kajero 8 **2018** **Issue No. 8**

Enhavo / Contents

Christer Kiselman: Salutvorto de la redaktoro 3–7

Christer Kiselman: A word from the editor 8–12

Paul Gubbins: Grava verko pri la esperanta literaturo. Recenzo de la libro de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, *Historio de la esperanta literaturo* 13–16

Klaus Schubert: Esperanto als komplexes System. Rezension von *The Phenomenon of Esperanto* 17–22

Leif Nordenstorm: Recenzo pri nova eldono de studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto verkita de Ulrich Lins 23–30

Ilona Koutny & Zbigniew Galor: Michel Duc Goninaz – esperantologo revizianta naivecon de la esperantista racio 31–36

Claude Roux: Michel Duc Goninaz kaj la reviziado de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* 37–41

Jacques Le Puil: Michel Duc Goninaz, lingvisto kaj akordionisto 42

Sabine Fiedler & Cyril Brosch: Detlev Blanke (1941–2016): Tuta vivo por interlingvistiko 43–45

Pri la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* 1999–2018 46

Michael D. Gordin: On Detlev Blanke: Beyond Esperanto 47–49

Haitao Liu: Detlev Blanke: mia interlingvistika patro 51–54

Probal Dasgupta: Paul Gubbins (1949–2016) 55–56

Carlo Minnaja: Memoro pri Reinhard Haupenthal (1945–2016) . 57–68

Jukka Pietiläinen: Zbigniew Galor – esperantista sociologo (1952–2017) 69–70

La paperan version publikigas Print version published by
KAVA-PECH, Dobřichovice
La elektronikan version publikigas Electronic version published by
Upsala universitato Uppsala University

ESPERANTOLOGIO
ESPERANTO STUDIES

EES

Kajero 8 2018 Issue No. 8

Redaktas Editor
Christer Kiselman

Redakta komitato en marto 2018 *Editorial Board as of March 2018*

Probal Dasgupta
Sabine Fiedler
Gotoo Hitosi
Ilona Koutny
Erich-Dieter Krause
Sergej Kuznecov
Haitao Liu
Ingrid Maier
Marc van Oostendorp
Humphrey Tonkin
John C. Wells

KAVA-PECH Dobřichovice (Prago/Prague)

Upsala universitato Uppsala University

Redaktoro / Editor

Christer Kiselman, Uppsala University, Department of Information Technology, P. O. Box 337, SE-751 05 Uppsala, Sweden. ⟨kiselman@it.uu.se⟩

Redakta komitato / Editorial Board

Detlev Blanke (1941-05-30 — 2016-08-20) estis membro de la Redakta komitato ekde la komenco en 1999.

Probal Dasgupta, Linguistic Research Unit, Indian Statistical Institute, 203 B. T. Road, IN-700108 Kolkata, India. ⟨probal53@gmail.com⟩

Michel Duc Goninaz (1933-09-06 — 2016-03-26) estis membro de la Redakta komitato ekde la komenco en 1999.

Sabine Fiedler, Universität Leipzig, Geisteswissenschaftliches Zentrum, Beethovenstraße 15, DE-04107 Leipzig, Germany. ⟨sfiedler@rz.uni-leipzig.de⟩

Gotoo Hitosi, Tohoku University, Faculty of Arts and Letters, Department of Linguistics, Sendai, JP-981 Japan. ⟨gothit@sal.tohoku.ac.jp⟩

Wim Jansen estis membro de la Redakta komitato ekde kajero 5 (2011) ĝis 2017-04-12.

Ilona Koutny, Universitato Adam Mickiewicz, Interlingvistikaj studoj, al. Niepodległośći 4, PL-61-874 Poznań, Poland. ⟨ikoutny@amu.edu.pl⟩

Erich-Dieter Krause, Semmelweisstraße 7, DE-04103 Leipzig, Germany. ⟨edklexik@t-online.de⟩

Sergej Kuznecov, Russian Federation, RU-125009 Moskva, Tverskaja 19-67. ⟨univer1755@yandex.ru⟩

Haitao Liu, Zhejiang University, School of International Studies, No. 866 Yuhangtang Road, CN-310058, Hangzhou, P. R. China. ⟨lhtzju@gmail.com⟩

Ingrid Maier, Uppsala University, Department of Modern Languages, P. O. Box 636, SE-751 26 Uppsala, Sweden. ⟨ingrid.maier@moderna.uu.se⟩

Marc van Oostendorp, Meertens Instituut, Joan Muyskenweg 25, NL-1096 CJ Amsterdam, The Netherlands. ⟨Marc@vanOostendorp.nl⟩

Humphrey Tonkin, University of Hartford, Office of the President Emeritus, Mortensen Library, West Hartford, CT 06117-1599, USA. ⟨tonkin@mail.hartford.edu⟩

John C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, UK. ⟨j.wells@ucl.ac.uk⟩

Yamasaki Seikô (1929-11-21 — 2017-10-10) estis membro de la Redakta komitato ekde la komenco en 1999.

Esperantologio / Esperanto Studies
estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de esperanto, same kiel recenzojn.

La revuo estas publikigata en du formoj, kiuj estas enhave identaj: presita sur papero kaj rete alirebla.

La paperan version publikigas la eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio.

La komputilreta versio estas publikigata de Upsala universitato sub la respondeco de profesoro Ingrid Maier. Ĝi estas alirebla ĉe la retadreso

`www.cb.uu.se/esperanto/` .

Ĉiu aŭtoro rajtas verki aldonajn notojn al sia jam publikigita artikolo. Tiuj aldonoj povos enhavi korektojn, komentojn kaj novajn referencojn.

Esperantologio / Esperanto Studies
is an international journal on all phenomena relating to Esperanto. It publishes articles based on original studies of the linguistic, historical, literary, psychological, sociological, and political aspects of Esperanto, as well as reviews.

The journal is published in two versions, which are identical in content: a print version and an electronic version.

The print version is published by KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prague), Czechia.

The electronic version is published by Uppsala University under the responsibility of Professor Ingrid Maier. It is available at the URL

`www.cb.uu.se/esperanto/` .

Every author may add an appendix to her or his published paper. Such appendices may contain corrections, comments, and new references.

ISBN 978-80-87169-87-2 (p) ISSN 1404-4749 (e)

Ok kajeroj de Esperantologio

Per la nuna oka kajero de Esperantologio ni finis la eldonadon de la revuo. Tiu decido estas tute laŭ la planoj faritaj jam dum la preparo de la unua kajero, publikigita en 1999 kaj prezentita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino en tiu jaro.

Pri kajeroj 1 kaj 2 bonvolu kontakti la redaktoron. Pri kajeroj 3–8, bonvolu informiĝi ĉe `www.kava-pech.cz/` aŭ kontakti `info@kava-pech.cz` .

Eight issues of Esperanto Studies

With the present eighth issue of Esperanto Studies we have arrived at the end of its publication. This is completely in accordance with the plans made already during the preparation of the first issue, published in 1999 and presented at the World Congress of Esperanto in Berlin in that year.

For issues 1 and 2, please contact the editor. For issues 3 through 8, please see `www.kava-pech.cz` or contact `info@kava-pech.cz/` .

KAVA-PECH

Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha)
info@kava-pech.cz www.kava.pech.cz

ISBN 978-80-87169-87-2 (p) ISSN 1404-4749 (e)

Produktita en Ĉeĥio / Produced in Czechia

2018

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 3–7

Salutvorto de la redaktoro

KARA LEGANTO

La Redakta komitato perdis tri el siaj membroj, Michel Duc Goninaz, Detlev Blanke kaj Yamasaki Seikô. Mortis Paul Gubbins, Reinhard Haupenthal kaj Zbigniew Galor. Pro tio ni dediĉas al tiu sesopo de elstaruloj dek memorigajn tekstojn en la nuna kajero de *Esperantologio*, el kiuj ok en esperanto kaj du en la angla.

⋆

Ni publikigas tri recenzojn, el kiuj du estas en esperanto kaj unu en la germana.

⋆

Paul Gubbins (1949-11-08 — 2016-08-06) verkis recenzon de la plursignife grandega libro *Historio de la esperanta literaturo* verkita de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Lia teksto estis preta kaj la presprovaĵoj korektitaj antaŭ lia forpaso.

⋆

Klaus Schubert recenzas specialan eldonon de la revuo *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (INDECS), dediĉitan al la fenomeno de esperanto. Estas grandega tasko, ĉar la recenzata teksto temas pri dek du malsamdirektaj kontribuaĵoj.

⋆

Leif Nordenstorm recenzas novan eldonon de la klasika libro verkita de Ulrich Lins pri la persekutoj kontraŭ esperanto.

⋆

Michel Duc Goninaz (1933-09-06 — 2016-03-26) membris en la Redakta komitato ekde la komenco en 1999 kaj saĝe konsilis nin. Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor skribas pri li; Claude Roux pri la reviziado de PIV, kiun Michel kaj Claude faris kunlabore; fine Jacques Le Puil kompletigas la vicon rakontante pri personaj memoroj.

Permesu al mi rakonti pri du el multaj kontaktoj kun Michel. Mi legis en PIV sub ⋆**cert**/**a**:

> ∼ **eco** [...] *oni ne havas absolutan ∼econ, ĉu la evoluado de la homo okazis ĉie laŭ sama maniero*; (PIV 1977)

Hazarde mi trovis ĉe Lanti:

> Oni ja ne havas absolutan certon, ĉu la evoluado de la homa speco okazis ĉie kaj ĉiam laŭ la sama maniero. (Lanti 1930:19)

Pro la apero de *certo* (ne *certeco*) ĉe Lanti — li ja ŝatis la mallongajn formojn sen *-eco* — mi skribis al Michel. En la nova eldono de la vortaro, kiun Michel estis revizianta, nome NPIV (2002) kaj PIV 2005 (2005), sekve aperas:

> **∼o** [...] *oni ja ne havas absolutan ∼on, ĉu la evoluado de la homa specio okazis ĉie k ĉiam laŭ sama maniero*$^{\mathrm{L}}$. (NPIV; PIV 2005)

Do nun kun la aldono de altigita L por Lanti. Etaj diferencoj (*speco / specio* kaj *laŭ la sama / laŭ sama*) restas.

En mia kunlaboro kun Michel kaj Claude pri la reviziado de PIV mi proponis verbon *ansibi* kun la klarigo

> **ansib/i** (ntr) ⟨Fiziko⟩ ⟨Teknikoj⟩ Senprokraste k ambaŭdirekte komuniki trans granda distanco (multaj lumjaroj), spite al la malpermeso de la relativeca teorio. **∼ilo**. Ricevilo k dissendilo por ∼a komunikado: *la sola komunikebleco de la kolonianoj estis ilia surŝipa ∼ilo* (*Ursula K. Le Guin*).

La citaĵo estas el Le Guin (1976:97). La angla vorto *ansible* por gravega, fakte necesa, dudirekta komunikilo estis enkondukita fare de Ursula en (1966:31), kaj mi estis uzinta ĝin en iu esperantlingva teksto — sed Michel ne volis enmeti ĝin en la novan PIV. Mi eble aldonu ke mi ekde 1965 forte admiras la verkojn de Ursula Kroeber LeGuin (1929-10-21 — 2018-01-22).

La 25-an de aprilo 1986 mi vizitis Michel kaj Arlette en ilia hejmo proksime al Aix. Estis belega kaj riĉa sperto.

⋆

Estis absolute neatendita informo kiun mi ricevis de membro de la Redakta komitato, nome Sabine Fiedler, ke Detlev Blanke (1941-05-30 — 2016-08-20) forpasis. Detlev estis ekde la unua kajero (1999) tre aktiva membro de la Redakta komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies*. Sed ne nur: jarojn antaŭe okazis vigla diskuto pri eventuala revivigo de la revuo de Paul Neergaard, kaj tiam Detlev kun saĝo konsilis nin. Li ĉiam kun granda scio prijuĝis manuskriptojn senditajn al EES. Li gvidis dum pluraj jaroj komisionon sub la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED); mi membris en tiu komisiono.

Kiam mi estis prezidanto de Akademio de Esperanto, mi invitis lin fariĝi korespondanto. La respondo ne estis evidenta, ĉar kiel interlingvisto li ja devus esti iom neŭtrala rilate al ĉiuj planlingvoj. Sed li akceptis, kio estis granda honoro por la akademio kaj por mi persone kiel ties prezidanto.

Detlev verkis plej gravan ĉapitron pri la interlingvistika aliro por la libro *Aliroj al esperanto* (2018).

En Nitro en julio de 2016 ni plurfoje interparolis, unu fojon triope tagmanĝis kune kun lia edzino Wera Blanke, parolante pri ĉiaj aferoj, kaj seriozaj kaj malseriozaj. Mi ricevis de li tri personajn mesaĝojn la 19-an de aŭgusto, la tagon antaŭ lia forpaso. Lia morto estas neimageble granda perdo por la interlingvistiko kaj por mi persone.

Sabine Fiedler kaj Cyril Brosch skribas pri li, same kiel Michael D. Gordin kaj Haitao Liu. Kaj Sabine kaj Haitao estas membroj de la Redakta komitato de EES. Michael estas por mi plej bone konata pro sia libro *Scientific Babel* pri la elekto de lingvoj en la sciencoj dum jarcentoj.

⋆

Probal Dasgupta, membro de la Redakta komitato, verkas memore pri Paul Gubbins (1949-11-08 — 2016-08-06), en esperanto kaj la angla.

⋆

Al Reinhard Haupenthal (1945-02-17 — 2016-09-29), elstara interlingvisto, bona konanto de volapuko, kaj ege aktiva publikigisto, Carlo Minnaja dediĉas memorigan eseon. Kvankam mi neniam renkontis Reinhard, ni nemalmulte korespondis — tute amikece (ĉu necesas tion diri?), precipe dum la lastaj jaroj.

⋆

Pri Zbigniew Galor (1952-07-16 — 2017-01-27) verkas Jukka Pietiläinen, lia kunverkinto de la sociologia studo *UEA en la konscio de esperantistoj* (2015). Mi renkontis Zbyszek plurfoje, lastfoje en Lillo en 2015.

⋆

Yamasaki Seikô (1929-11-21 — 2017-10-10) estis membro de la Redakta komitato ekde la unua kajero kaj ĉiam donis al mi bonajn konsilojn. Ni multe interparolis, kaj en Tokio kaj en Zagrebo kaj aliaj lokoj.

⋆

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1 (1999:3–4).

⋆

La revuo estas ia daŭrigo de la revuo *Esperantologio*, kiun Paul Neergaard (1907-02-13 — 1987-11-13) redaktis kaj eldonis dum la jaroj 1949–1961. Aperis ses kajeroj ampleksantaj entute 424 paĝojn. Pli pri Paul vi povos legi en mia artikolo (2012).

Tamen en la nuna revuo ni komprenas per la termino *esperantologio* pli vastan sciokampon ol oni faris en tiu de Neergaard.

Inter la revuo de Paul kaj la komenco de la nuna aperis paŭzo de tridek ok jaroj. Eble nun estos nova paŭzo de tridek ok jaroj, t.e. ĝis la jaro 2018+38 = 2056 ...

⋆

Mi kore dankas al ĉiuj verkintoj, la kontribuintoj al la enhavo de la ok kajeroj. Mi same kore dankas al ĉiuj membroj de la Redakta komitato, kiuj kun saĝo konsilis min, kaj al ĉiuj juĝlegantoj, kiuj prijuĝis la alvenintajn manuskriptojn, sendis korektojn kaj formulis rekomendojn.

⋆

Mi finis antaŭ iom da tempo la redaktan laboron kune kun Renato Corsetti kaj Probal Dasgupta de la libro *Aliroj al esperanto* (2018). Nun mi finis la redaktadon de la revuo *Esperantologio*, al kiu mi mem kontribuis per du artikoloj, nome en kajero 5 (2011) kaj kajero 7 (2015). Mi havas ankoraŭ ion por fari, ekzemple verkon pri la jidogramatiko de Zamenhof en komparo kun lia Lingvo universala.

⋆

Kaj ĉar estas la lasta kajero de la revuo (tute laŭplane, ekde 1999, kiam mi prezentis la unuan kajeron en la Universala Kongreso en Berlino), mi diru kelkajn vortojn kial mi entute interesiĝis pri lingvoj. Kaŭzis tion mia plej inspira instruisto lerneja de ĉiuj kategorioj, Karl Axnäs (1899-06-03 — 1984-05-06), doktoro pri slavaj lingvoj kaj mia instruisto pri la germana lingvo. De li mi lernis ne nur la germanan, sed multe pri lingvoj ĝenerale kaj pri etimologio. Dum 1953 li gvidis kurson pri la rusa lingvo en la sveduja nacia radio, kiun mi sekvis, ankoraŭ ne dekkvarjara.

Dum mallonga periodo lin anstataŭis instruist-kandidato, Henrik Birnbaum (1925-12-13 — 2002-04-30), kiu, spite al la mallonga tempo, donis al mi neforgeseblan impreson. Poste li fariĝis unu el la plej elstaraj slavistoj de la planedo. Li estis profesoro ĉe la *University of California at Los Angeles*.

Estas granda privilegio povi frue en la vivo lerni de tiaj brilaj intelektuloj.

Christer Kiselman

Referencoj

Kiselman, Christer. 2012. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. **En:** Blanke, Detlev, red. 2012. *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978-92-9017-117-1.

Kiselman, Christer Oscar; Corsetti, Renato; Dasgupta, Probal, redaktoroj. 2018. *Aliroj al esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 229 pp. ISBN 978-80-87169-86-5.

Lanti, E. 1930. *Naciismo; Studo pri Deveno, Evoluado kaj Sekvoj*. Lepsiko: Sennacieca Asocio Tutmonda: Eldona Fako Kooperativo.

Le Guin, Ursula K. 1966. *Rocannon's World*. Nov-Jorko, NY: Ace Books, Inc.

Le Guin, Ursula K. 1976. *City of Illusions*. Frogmore, St Albana, Herts: Panther. (Unue publikigita en 1967.)

La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto (NPIV). 2002. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto (PIV). 1977. (Dua eldono per "offset", sen̂anĝa de la unua el 1970.) Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005 (PIV 2005). 2005. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 8–12

A word from the Editor

Dear Reader:

The Editorial Committee lost three of its members: Michel Duc Goninaz, Detlev Blanke, and Yamasaki Seikô. Paul Gubbins, Reinhard Haupenthal, and Zbigniew Galor also passed away. Because of this we publish in this issue of *Esperanto Studies* ten obituaries, of which eight are in Esperanto and two in English.

Also in this issue there are three reviews, of which two are in Esperanto and one in German.

⋆

Paul Gubbins (1949 November 08 — 2016 August 06) wrote a review on the gigantic work *Historio de la esperanta literaturo* (*History of the Esperanto Literature*) written by Carlo Minnaja and Giorgio Silfer. His text was ready and the page proofs were corrected before he passed away.

⋆

Klaus Schubert reviews a special issue of the journal *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (INDECS), dedicated to the "The Phenomenon of Esperanto." It is a great undertaking, since the reviewed text is about twelve quite different approaches to Esperanto.

⋆

Leif Nordenstorm writes a review about the new edition of the classical book by Ulrich Lins on the persecutions against Esperanto.

⋆

Michel Duc Goninaz (1933 September 06 — 2016 March 26) was a member of the committee from its start in 1999 and gave us most valuable advice. Ilona Koutny and Zbigniew Galor write about him, as does Claude Roux, describing their work on revising the all-important dictionary *Plena ilustrita vortaro de Esperanto* (*Complete Illustrated Dictionary of Esperanto*), called PIV. In a third text to the memory of Michel, Jacques Le Puil shares with us some personal memories.

Allow me to tell you about two of the many contacts I had with Michel. In the dictionary PIV I read under the entry ⋆**cert/a** (the adjective meaning 'certain'):

> ∼**eco** [...] *oni ne havas absolutan ∼econ, ĉu la evoluado de la homo okazis ĉie laŭ sama maniero*; (PIV 1977)

In this quotation we see the word *certeco* 'certainty' with the ending *-eco*, indicating a property. I happened to read in a book by Lanti:

> Oni ja ne havas absolutan certon, ĉu la evoluado de la homa speco okazis ĉie kaj ĉiam laŭ la sama maniero. (Lanti 1930:19)

Lanti often preferred shorter forms, like *certo*, derived from the adjective *certa* 'certain', rather than the longer form with the ending *-eco*. I wrote to Michel. As a consequence, we can now read in the version of the dictionary which Michel had revised, viz. NPIV (2002) and the later PIV 2005 (2005):

> ∼**o** [...] *oni ja ne havas absolutan ∼on, ĉu la evoluado de la homa specio okazis ĉie k ĉiam laŭ sama maniero*$^{\mathrm{L}}$. (NPIV; PIV 2005)

Thus now with the addition of the superscript L for Lanti. Small differences (*speco / specio* and *laŭ la sama / laŭ sama*) remain.

In my collaboration with Michel and Claude during the revision of PIV, I proposed a verb, *ansibi*, with the definition

> **ansib/i** (ntr) ⟨Physics⟩ ⟨Technology⟩ To communicate in both directions and without delay over large distances (several light years), in spite of the prohibition imposed by the theory of relativity. ∼**ilo**. Receiver and transmitter for this kind of communication: *The colonists' only communications with Earth,* [...] *was by the ansible, the instantaneous transmitter, aboard their ship.* (*Ursula K. Le Guin*).

The quotation is from Le Guin (1976:97). The word *ansible* for this extremely important—in fact absolutely necessary—instantaneous communication device was introduced by Ursula in (1966:31), and I had used it in some text in Esperanto, but Michel did not want it in the new PIV. Maybe I should add that, since 1965, I have greatly admired the novels and short stories by Ursula Kroeber LeGuin (1929 October 21 — 2018 January 22).

On 1986 April 25, I visited Michel and Arlette in their home near Aix. It was a very rich experience.

⋆

Like Michel, Detlev Blanke (1941 May 30 — 2016 August 20) was a member of the Editorial Committee from the beginning. But even before that, during the discussion on a possible revival of the journal edited by Paul Neergaard, he contributed wisely to the discussion on whether or not attempt to revive it,

and, if so, how to do this. He always with great knowledge judged manuscripts received by EES. He led during several years a committee under the Center for Research and Documentation on World Language Problems (CED); I was a member of this committee.

When I was President of the Esperanto Academy, I invited him to become a corresponding member. The answer was not obvious, since, as an interlinguist, he should be kind of neutral in relation to all constructed languages. But he accepted, which was a great honor for the academy and for me personally as its president.

Detlev wrote a most important chapter on the interlinguistic approach to Esperanto for the book *Aliroj al esperanto* (*Approaching Esperanto;* 2018).

During the congress in Nitra in July 2016 we talked several times and once had lunch together, also with his wife Wera Blanke, discussing a lot about serious and less serious things. I received from him three personal messages on August 19, the day before he died. His death is an unimaginably great loss for interlinguistics and for me personally.

Sabine Fiedler and Cyril Brosch write about him, as does Michael D. Gordin and Haitao Liu. Both Sabine and Haitao are members of the Editorial Board. Michael is for me best known for his book *Babel of Science* on language choice in the sciences over centuries.

⋆

Probal Dasgupta, member of the Editorial Board, writes to the memory of Paul Gubbins (1949 November 08 — 2016 August 06), in English and Esperanto.

⋆

Carl Minnaja dedicates an essay to the memory of Reinhard Haupenthal (1945 February 17 — 2016 September 29), who was an outstanding interlinguist, an expert on Volapük, and a most active publisher. I never met Reinhard, but corresponded with him extensively—totally friendly (is it necessary to mention this?), especially during the last years.

⋆

Jukka Pietiläinen writes about his colleague Zbigniew Galor (1952 July 16 — 2017 January 27). They coauthored the sociological study *UEA as viewed by Esperantists* (2015). I met Zbyszek several times, the last time in Lille in 2015.

⋆

Yamasaki Seikô (1929 November 21 — 2017 October 10) was a member of the Editorial Committee from the beginning and always gave me good advice. We talked a lot, in Tokyo, Zagreb and several other places.

⋆

For the editorial policy of the journal, please see the Editorial Statement in the first issue (1999:5–6).

⋆

The journal is a kind of continuation of the journal *Esperantologio*, which Paul Neergaard (1907 February 13 — 1987 November 13) edited and published during the years 1949–1961. Six issues were published, comprising a total of 424 pages. You can read more about Paul in my article (2012).

However, in the present journal, we use the term *esperantologio* in a wider sense than one did in Neergaard's journal.

Between Paul's journal and the start of the present one, there was a gap of 38 years. Maybe now there will be a new pause of 38 years, i.e., up to the year $2018 + 38 = 2056$ ...

⋆

I am most grateful to all those who have contributed their articles to the eight issues of the journal. The same applies to all members of the Editorial Committee, who with wisdom advised me during the years, and to all referees, who have judged the incoming manuscripts, commented on them, and formulated recommendations.

⋆

I finished some time ago the editorial work together with Renato Corsetti and Probal Dasgupta for the book *Aliroj al esperanto* (*Approaching Esperanto;* 2018). Now I have finished editing the journal *Esperanto Studies*, to which I contributed two studies, in issues number 5 (2011) and number 7 (2015). There is still something to be done, for instance a study of Zamenhof's Yiddish grammar in comparison with his Universal Language.

⋆

And, since this is the last issue of the journal (as planned from the start in 1999, when I presented the first issue at the World Congress of Esperanto in Berlin), let me mention why I became interested in languages in the first place. The reason is my most inspiring teacher in all categories, Karl Axnäs (1899 June 03 — 1984 May 06), who had a PhD in Slavic languages and was my teacher of German. From him I learnt not only German but also a lot

about languages in general and about etymology. In 1953, he led a course in Russian in the Swedish National Radio, which I followed, not yet fourteen years old.

During a short period, Karl Axnäs was replaced by Henrik Birnbaum (1925 December 13 — 2002 April 30), at the time a trainee teacher. In spite of the short time, he made an unforgettable impression on me. Afterwards he became one of the leading Slavicists of the planet. He was a professor at University of California at Los Angeles.

It is a great privilege to have been able to learn early in life from such brilliant intellectuals.

Christer Kiselman

References

Kiselman, Christer. 2012. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. **In:** Blanke, Detlev, Ed. 2012. *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978-92-9017-117-1.

Kiselman, Christer Oscar; Corsetti, Renato; Dasgupta, Probal, Editors. 2018. *Aliroj al esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 229 pp. ISBN 978-80-87169-86-5.

Lanti, E. 1930. *Naciismo; Studo pri Deveno, Evoluado kaj Sekvoj*. Leipzig: Sennacieca Asocio Tutmonda: Eldona Fako Kooperativo.

Le Guin, Ursula K. 1966. *Rocannon's World*. New York, NY: Ace Books, Inc.

Le Guin, Ursula K. 1976. *City of Illusions*. Frogmore, St Albana, Herts: Panther. (First published in 1967.)

La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto (NPIV). 2002. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto (PIV). 1977. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda. (Second edition, unchanged from the first in 1970.)

Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005 (PIV 2005). 2005. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 13–16

Grava verko pri la esperanta literaturo

Paul Gubbins

Recenzo de la verko

Minnaja, Carlo; Silfer, Giorgio. 2015. *Historio de la esperanta literaturo.* La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro. XII + 748 pp. ISBN 3-906595-21-8.

Finfine esperantistoj disponas pri solida, legebla kaj leginda konsult-libro esence pri la literaturo (ĉefe originala sed iome tradukita) de Esperanto sed ankaŭ pri la movadaj eventoj, kiuj ĝin akompanis kaj ties direkton almenaŭ parte determinis. Unuafoje en la 54 ĉapitroj de *Historio de la esperanta literaturo* (poste mallongigita al HEL) troveblas serioza provo sekvi la fluon kaj evoluon de kvin periodoj da esperanta verkado de 1887 ĝis 1993 (ĉapitroj 1–49, verkitaj de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer kunlabore) plus la jaroj ĝis 2015 (ĉapitroj 50–54, verkitaj de Carlo Minnaja).

Al tiuj ĉi ĉapitroj, prezentitaj laŭ facile digestebla, rakonta stilo, kun abundaj fotografaĵoj kaj aliaj bildoj, estas aldonitaj pli-malpli 50 paĝoj da referencoj, kiuj ampleksigas komentojn en la ĉapitroj; bibliografio; preskaŭ 80-paĝa antologio, konsistanta el foje konataj, foje malpli konataj poeziaj kaj prozaj eltiraĵoj; kaj preskaŭ 60 paĝoj da indeksoj pri bildoj, verkoj, revuoj, temoj kaj personoj.

Kunaŭtoris la volumon du el la plej kleraj literaturistoj en la nuna esperanta mondo: Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Minnaja, denaska esperantisto, multe tradukis, inkluzive de verkoj de Goldoni kaj de Cesare Pavese, kaj kompilis 1400-paĝan vortaron italan-esperantan. Priliteraturaj eseoj kaj artikoloj liaj troviĝas en ĉiuj gravaj esperantaj revuoj. En HEL respondecis Minnaja aparte pri la referencoj, la antologio kaj la post-1993-aj paĝoj.

Kun Minnaja eklaboris Silfer jam en 1969, kiam ili kunfondis kun aliaj la literaturan rondon *La Patrolo*. En 1970 li kunfondis la revuon *Literatura Foiro* kaj en 1991 la Esperanto-Centron de PEN-Klubo Internacia. Li verkis kanzonojn kaj dramojn kaj, en HEL, kontribuis la paĝojn pri teatro.

Bone estas, ke sur teatron, tiun ĉi hontinde neglektatan aspekton de esperanta literaturo, oni turnas la spoton. Tamen iom kuriozas, ke en volumo, en kiu la aŭtoroj "klopodis trakti ekvilibre kaj poezion kaj prozon, kun tute

specifa atento al la teatro" (Antaŭparolo, XI), mankas en la antologia parto (pp. 611–688) "specifa atento" ĝuste al teatraĵoj. Reprezentatas en la poezia parto du eltiraĵoj el versdramoj, el *Jozefo*, de Jakob Applebaum, kaj el *Sonĝe sub pomarbo*, de Julio Baghy — la unuakta paroladeto de la Strigo, koincide unu el miaj plej ŝatataj eroj en la dramo. Tamen en la proza parto, nenio: eĉ ne pionira monologo, ekzemple de Frederic Pujulà i Vallès, el la kolekto *La rompantoj* (aŭtoro, cetere, nur pluke pritraktita en HEL: utila biografieto (pp. 55–56) sed nenia analizo de la realisme-psikologie motivitaj dramoj); aŭ eĉ ne elektitaj scenoj el unuaktaĵo de Marjorie Boulton, ekzemple la drame skua, lingve suka, daŭre aktuala *Liberiĝo*.

Almenaŭ tutan ĉapitron (la 31-an) ricevas Boulton, solidan, ne ĉiam senkritikan resumon ĉefe de la poemaro. Ankaŭ la personeco krokize-klare kaptiĝas: "Artikoloj, prelegoj, vojaĝoj, instruado en someraj lernejoj, abunda leterado kun aliaj verkistoj: ŝia aktivado estas intensa ĝis elĉerpiĝo, sed ne ĉesas versado" (p. 290). Ĝenas nur la rimarko, ke ŝia "vivo ne prezentas grandajn maltrankvilojn" (p. 287): la jaroj, aparte la lastaj, kiam Boulton estris porinstruistan kolegion, kaj ties postefikoj, certe malagrablis. Kaj mi bedaŭras, ke la aŭtoroj opiniis, ke "ne estas maldiskreto" (p. 591) mencii rilatojn inter Boulton kaj Paul Neergaard. Mortis la dano, kiel agnoskite, antaŭ pli ol kvaronjarcento, sed ankoraŭ vivas la anglino: miaopinie superflua invado en la pasintecon de esence privata persono, kia Boulton.

Bedaŭrindas, ankaŭ, ke ne estas profunde esplorataj la teatraĵoj de Boulton. Legeblas en la Boulton-ĉapitro, ke la unuaktaĵo *La vaka seĝo* estas "sendube **ŝia plej bona teatraĵo**, inter la ĉefverkoj de la nialingva asfiksia repertuaro" (p. 292). Tamen mankas argumentoj por pravigi la aserton, kiu baziĝas sur subjektiva, neniel science subtenata opinio. Notindas krome, ke, por lerni iom pli pri la stilo de la boulton-aj unuaktaĵoj, necesas salti al ĉapitro 38, kiu pritraktas pli ĝenerale teatraĵojn el la t.n. kvara periodo (1952–1970) — erao en kvinperioda disdivido de la esperanta literaturo, cetere, kiu, kvankam eble aplikebla al prozo kaj poezio, malkonvenas al originale verkitaj teatraĵoj. Tiu ĉi disdivido vaporiĝas ĉirkaŭ la jaro 1993, kiam oni emas ekparoli svage pri postmodernismo — kaj ĉe HEL ankaŭ la finaj kvin ĉapitroj, verkitaj kiel supre notite sole de Minnaja, kiuj pritraktas la jarojn post 1993, efikas iom apendice, ricevante ekzemple iom pli ol 70 paĝojn kontraste al pli ol 100 por la 16-jara t.n. dua periodo.

La mencio, parenteze, pri Neergaard/Boulton, troviĝas en la referenca sekcio (pp. 559–608). Do kun abundaj piednotoj, kiuj trenas la okulojn al la malsupro de la paĝo, tiel ke foje oni ne facile retrovas la ĵus legitan linion, kaj kun la bezono ĉasi informojn en aliaj ĉapitroj aŭ eĉ inter la referencoj, la

libro foje iritas. Prefere, laŭ tiu ĉi recenzanto, puŝi la (ĝenerale nur formalajn kaj meĥanikajn) piednotojn al ĉapitro-fino, kaj enplekti la referencojn en la tekston mem: se la enhavo sufiĉe gravas por esti reference pritraktata, do ĝi meritas lokon en la koncerna ĉapitro. Kaj, pro la diversaj enkondukaj paĝoj (dankoj, signoj kaj mallongigoj, antaŭparolo), kaj pro glosoj, bibliografio, poste la antologia parto, kaj kvin (diable!) indeksoj, la volumo unuavide konfuzas. Eble, tamen, nura mallerteco mia: Detlev Blanke (2015) konsideris, ke la "tre detala enhavtabelo (I–VI) kaj kelkaj indeksoj faciligas la orientiĝon pri la riĉa enhavo". Malpli pozitiva montras sin Blanke (2016), prave atentigante pri la dupaĝa "magra bibliografio" de HEL kaj ties mankantaj fontindikoj.

Pri la "riĉa enhavo" certe eblas konsenti kun Blanke. Sukcese trapenetrinte la remparojn de signoj, glosoj, indeksoj, k.s., oni eniras 54-ĉambran kastelon klare montrantan la erudicion de ties du posedantoj. Kiel dirite, necesas foje salti de ĉambro al ĉambro por kompletigi impreson nur parte akiritan, dum de tempo al tempo la ekspoziciaĵoj emas rakonti pli ol analizi (argumenteblas, ekzemple, ke apenaŭ sufiĉas po ne multe pli ol duonpaĝo por pritrakti romanojn kiajn *Kiel akvo de l' rivero* (pp. 315–316) aŭ *La granda kaldrono* (pp. 389–390)). Estus konsilinde, en venonta eldono, konsideri, ĉu rezigni pri la antologiaj paĝoj kaj utiligi la spacon por resti pli longe ĉe kelkaj eroj kaj ilin pli funde dissekci.

Tamen jen la — parenteze bonveniga — aŭtora dilemo. Se la literaturo de Esperanto ne tiom abundus, disponeblus pli da spaco por pli rigore analizi. Do, kiel ĉiuj volumoj tiaj, HEL proponas kompromison ne inter kvanto kaj kvalito (ambaŭ evidentas) sed inter kiomo kaj kielo. Kaj ĝuste la kielo interesas. Efektive, HEL estas precize tio, kio kovrile legeblas: historio, do legolibro (kontraste al la mejloŝtona kaj same siaspece impona konsultlibro de Geoffrey Sutton (2008)). La mallongaj, ofte malpli ol dekpaĝaj ĉapitroj de HEL, ornamitaj per ilustraĵoj kaj fotografaĵoj, prezentas stile fluan kaj enhave frandan aliron ne nur al la literaturo de Esperanto (originala kaj tradukita) sed ankaŭ al ties movada kaj sociologia kunteksto. Strukturo tia, do relative koncizaj, facile digesteblaj pecoj, kvankam foje ĝena pro nekompleteco, invitas kaj instigas al legado. Tiel HEL servas al diversaj esperantaj publikoj, inkluzive ne nur de tiu de la ĝisosta literaturo-amanto sed ankaŭ de tiu de la novica, lastatempa lerninto, scivolema pri aspektoj preter nur gramatikaj de la nove akirita lingvo. Tuŝi larĝan publikon tian, ne nur fake sciencan, ŝajnas al mi granda pluso de HEL.

Klare, ne ĉio perfektas: se tiel estus, ne temus pri homa kreitaĵo. Kontribuintoj al la fejsbuka *Literatura Babilejo*, tuj post la apero de HEL, notis la neglekton de pluraj ŝatataj verkoj aŭ aŭtoroj, ekzemple la finnlandaj verk-

istoj Reino Eriksson kaj Eija Salovaara. Al ellasito-listo nepras aldoni la japanon Kisaku Tabata, kreinton de la unuaktaĵo *Korvo*, unu el la plej riĉe tavoligitaj dramoj originale verkitaj en Esperanto. Krome ne eviteblas, en verko tiel ampleksa, tiel ambicia, kiel HEL, tajperaroj, ekzemple "Bosboom" anstataŭ Borsboom (p. 6) aŭ "Marylin Monroe" anstataŭ Marilyn Monroe (p. 397). Prefere ankaŭ tria persono por eventuale pli objektive pritrakti en la 40-a ĉapitro la signifon de la itala literatura rondo *La Patrolo*, en kiu kaj Minnaja kaj Silfer kerne aktivis.

Facilas piki, malfacilas verki — aparte vastan volumon tian, kia HEL. Jen sincera provo reliefigi esperantan literaturon (kaj socion), kiu — sonas kliŝe tion diri — nepre trovu lokon sur la bretoj de ĉiu eĉ duonserioza adepto de la zamenhofa lingvo. Kun la enciklopedio de Sutton, esperantistoj (almenaŭ angleparolantaj) disponas pri du ŝlosilaj verkoj, kiuj skrupule kaj konsekvence malfermas, anstataŭ unuopajn pordojn, la vastan pordaron de la literaturo de Esperanto. Tiuj, kiuj eniras, ne bedaŭros.

Referencoj

Blanke, Detlev. 2015. Enciklopedie: Historioj de Esperanto-Literaturo (*Sutton* kaj *Minnaja/Silfer*). *Informilo por interlingvistoj*, numero 94–95, pp. 17–18. ISSN 1385-2191.

Blanke, Detlev. 2016. Iom pri literaturhistoriaj enciklopedioj de esperanto. *La Ondo de Esperanto*, 2016:1, p. 20.

Sutton, Geoffrey. 2008. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887–2007*. Nov-Jorko, NY: Mondial. x + 728 pp. ISBN 978-1-59569-090-6.

Paul Gubbins (1949-11-08 — 2016-08-06) studis lingvojn en sia hejmlando Britujo kaj doktoriĝis en Kanado pri germana romantikismo. Reveninte Anglujen, li trejniĝis kiel ĵurnalisto kaj tiel laboris, antaŭ ol ekinstrui la germanan ĉe nordangla universitato. Pro draste ŝrumpinta intereso en Britujo pri lingvo-lernado li komencis instrui ĵurnalismon ĉe Staffordshire University, kie li laboris ankoraŭ komence de 2016. En Esperantujo li ricevis plurajn premiojn en la belartaj konkursoj de UEA, ĉefe en la branĉo "teatro", kaj li aŭtoris dramojn, du lernolibrojn pri Esperanto kaj aliajn lernmaterialojn, kaj plurajn priliteraturajn artikolojn. Li redaktis la dulingvan esperantan/anglan antologion *Star in a Night Sky* (2012) kaj estis ĉefredaktoro de Monato. Li estis preparanta volumon pri dramoj originale verkitaj en Esperanto.

Ricevita 2016-02-03
Akceptita por publikigo 2016-02-10

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 17–22

Esperanto als komplexes System

Klaus Schubert

Rezension von
Tonkin, Humphrey; Poór, Veronika (Hg.). 2015. *The Phenomenon of Esperanto* (Themenheft). *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (INDECS) 13(2). `http://indecs.eu/index.php?s=toc`

Komplex oder einfach? Esperanto ist die einfachste Sprache der Welt. So hört man es in der Werbung der Esperanto-Verbände immer wieder. Jetzt hat sich ausgerechnet eine Zeitschrift, der es um komplexe Systeme geht, dieser einfachsten aller Sprachen angenommen. Das verspricht Spannendes.

Das Themenheft *The Phenomenon of Esperanto*, herausgegeben von Humphrey Tonkin und Veronika Poór, ist 2015 erschienen. Auf ein kurzes Vorwort von Veronika Poór (Budapest) folgen zwölf Beiträge von bekannten Interlinguisten. In seiner Einleitung umreißt Humphrey Tonkin (Hartford) das Feld. Er bespricht zunächst das Dilemma der teilnehmenden Beobachtung: Wer Esperanto spricht, wird in der Wissenschaftsgemeinschaft oft als voreingenommen abgelehnt, und wer es nicht spricht, kann sich über Sprache und Sprechergemeinschaft des Esperanto nicht sehr qualifiziert äußern. Knapp und präzise erörtert Tonkin die schwierige Frage der wissenschaftlichen Erfassbarkeit der Sprachgemeinschaft des Esperanto und die zentralen Problemkreise der mit dem Esperanto verbundenen Weltanschauungen, der Rivalität möglicher internationaler Sprachen und des Esperanto-Unterrichts. Interessant sind Tonkins kurze, aber analytische Anmerkungen zum Esperanto als Gegenstand der Forschung und der Geistesgeschichte sowie zur Rolle übersetzter und originaler Literatur im Esperanto.

Esperanto als komplexes System? Die Autoren gehen innerhalb dieses Rahmenthemas vier großen Fragenkreisen nach:

(1) der Komplexität des Esperanto in Sprachsystem und Sprachverwendung,
(2) der Entwicklung des Esperanto vom Konstrukt zur Sprache,
(3) dem Esperanto als gesellschaftlichem Phänomen und
(4) der Ausstrahlung der Interlinguistik auf das wissenschaftliche Umfeld.

Der erste Fragenkreis, die Komplexität des Esperanto, steht im Mittelpunkt mehrerer Aufsätze. Ilona Koutny (Poznań) fragt, inwieweit und auf welchen Ebenen sprachliche Komplexität geplant, verwirklicht und aufrechterhalten werden kann. Sie ordnet Ethnosprachen, durch Sprachplanung veränderte Sprachen, Plansprachen und nichtsprachliche Zeichensysteme (wie Programmiersprachen) auf einer Skala zwischen den Polen ‚natürlich' und ‚geplant' an (wie schon bei Eco 1968/1985:20–27 und Schubert 2014:210 Abb. 1). Das Kriterium ‚geplant' analysiert sie dann detailliert für das Esperanto. Hierbei hebt Koutny insbesondere die Flexibilität der Syntax durch die Objektmarkierung und die Komplexität der voll agglutinativen und sehr produktiven Wortbildung hervor (vgl. Schubert 2015).

Wim Jansen (Amsterdam) erkundet Esperanto mit den Mitteln der Funktionalen Diskursgrammatik (Hengeveld & Mackenzie 2008). Diese grammatische Schule versucht, in die Grammatik das Handeln eines Sprechers in der Interaktion mit anderen, damit insbesondere das kommunikative Handeln und hierdurch die sprachliche Äußerung in der Kommunikationssituation einzubeziehen und als Ausgangspunkt für alle weiteren Analyseebenen zu wählen. Hierdurch schließt dieses Modell große Teile der Handlungstheorie, der Pragmatik und erst dann das traditionelle Objekt grammatischer Theorien, das Sprachsystem, mit ein. Ein solches Modell muss ganz ohne Zweifel eine hochkomplexe Wirklichkeit abbilden. Das spezifisch auf das Esperanto Bezogene in Jansens Darstellung kommt dort zum Ausdruck, wo er Phänomene wie etwa die Reflexivpronomen diskutiert, bei denen die behauptete Kompositionalität des Esperanto einer intransparenten, konventionalisierten Bedeutungsbildung weicht.

Federico Gobbo (Amsterdam/Turin/Mailand) richtet sein Augenmerk ebenfalls primär auf die grammatische Ebene und bespricht ein besonders komplexes Problem: die maschinelle Übersetzung und die Rolle des Esperanto darin. Er greift damit aus heutiger Sicht ein Thema neu auf, das schon van Zuijlen (1992) speziell unter Komplexitätsaspekt aus einem maschinellen Übersetzungsprojekt mit Esperanto heraus behandelt. Gobbo beginnt seine Untersuchung mit einer Analyse des heutigen Esperanto in den Kategorien der Theorie komplexer adaptiver Systeme. Hier zeigt sich, dass dieses Instrument gut geeignet ist, die kollektive, dezentrale, autoritätslose Entwicklung des Esperanto zusammen mit den zentralen Sprachlenkungsbestrebungen darzustellen. Im Ergebnis bestätigt Gobbo den Befund anderer Wissenschaftler, dass Esperanto die Entwicklung vom Konstrukt zur vollgültigen Sprache erfolgreich durchlaufen hat. Gobbo gibt einen schnellen Überblick über die Rolle des Esperanto in frühen Projekten der maschinellen Übersetzung seit Mitte

des 20. Jahrhunderts und in der mechanischen Übersetzung in den Jahren davor (genauer bei Schubert 2006) und deutet die verschiedenen Rollen des Esperanto als eine Art „Universalgrammatik“, als Zwischensprache oder als Ausgangs- und Zielsprache an, wobei die erste und die zweite dieser Rollen sich der besonderen Regelstringenz des Esperanto bedienen und die dritte es lediglich als erfolgversprechende Alternative neben alle anderen Sprachen stellt. Am Ende vergleicht Gobbo drei Übersetzungen eines englischen Zeitungstextes ins Esperanto, von denen einer von einem Übersetzer und zwei von maschinellen Übersetzungssystemen erstellt wurden. Das Ergebnis ist nicht überraschend: Wo schematisch umgesetzt werden kann, sind maschinelle Systeme schnell und effizient, wo aber intelligente Arbeit am Text erforderlich ist, ist der professionelle Übersetzer weit überlegen. Komplexität ist ganz offenbar nicht leicht automatisierbar, auch nicht mit statistischen Techniken.

Detlev Blanke und Wera Blanke (Berlin) untersuchen die Komplexität des Esperanto auf der funktionalstilistischen Ebene. Sie widerlegen das weit verbreitete Vorurteil, wonach die „Künstlichkeit“ einer Sprache sie für bestimmte Kommunikationsaufgaben ungeeignet mache. Die beiden Autoren erwähnen die oft fachsprachlichen Wikipedia-Seiten, die neuerdings auch in Semiplansprachen mit sehr geringer Sprecherzahl veröffentlicht werden, und widmen ihre Aufmerksamkeit dann sehr ausführlich der deutlich umfangreicheren wissenschaftlichen und fachlichen Literatur auf Esperanto. Sie erinnern an die zentrale Bedeutung der Terminologieentwicklung für den Aufbau einer Wissenschaftssprache und die entscheidende Rolle, die der Urheber der Terminologiewissenschaft, Eugen Wüster, beim Aufbau der Fachsprache im Esperanto gespielt hat. Der Aufsatz beeindruckt auch durch seine außerordentliche Belegfülle.

Das Thema Komplexität setzt sich in anderer Weise im Beitrag von Sabine Fiedler (Leipzig) fort. Sie betrachtet die phraseologische Analyseebene. Phraseologie ist der Bestand an nicht grammatikalisierten, aber doch festen sprachlichen Versatzstücken, deren Bedeutung sich nicht als Summe der Bedeutungen der Wörter und Morpheme ableiten lässt. Die Phraseologiebildung ist daher ein Faktor, der der postulierten Einfachheit der Plansprache entgegenwirkt und die semantische und pragmatische Komplexität erhöht. Fiedler untersucht die drei Hauptquellen der Phraseologiebildung im Esperanto: Entlehnung, Planung und Entstehung in der Sprechergemeinschaft selbst. Letzterer Faktor ist ein deutlicher Indikator für den Übergang vom konstruierten System zur vollgültigen, komplexen Sprache.

Der zweite Fragenkreis, die Entwicklung des Esperanto vom Konstrukt zur Sprache, ist in den Beiträgen von Fiedler und Jansen schon angedeutet.

Explizit dieser Frage widmet sich jedoch Duncan Charters (Elsah). Damit aus einem planmäßig entwickelten System eine echte Sprache wird, reicht es nicht, Wörterbuch und Grammatik zu veröffentlichen. Man muss eine Sprachgemeinschaft aufbauen und dafür sorgen, dass die Sprache sich im unreflektierten Gebrauch ohne weitere Lenkung entwickeln kann. Charters schildert Zamenhofs Arbeit an diesen ersten Entwicklungsstufen des Esperanto. Er zeigt den propädeutischen Effekt von Esperantokenntnissen auf den Erwerb weiterer Fremdsprachen und die empirischen Schulversuche, die im Laufe der Jahrzehnte mit Esperanto durchgeführt worden sind. Die heutigen Lernformen im Internet und in den sozialen Medien berührt Charters kurz.

Der dritte Fragenkreis, Esperanto als gesellschaftliches Phänomen, ist Gegenstand dreier sehr unterschiedlicher Beiträge. Die Sprachwerdung einer Plansprache mag komplex sein, aber das Leben ist sehr viel komplexer. Sho Konishi (Oxford) skizziert gesellschaftliche Entwicklungen im Japan des beginnenden 20. Jahrhunderts, in denen sich die Öffnung zur westlichen Wissenschaft, Science-Fiction-Literatur, Demokratisierung, Anarchiebewegung und viele andere Strömungen vermischen. Esperanto spielt hier in einem sehr vielschichtigen Umfeld die Rolle als Modernitätssignal und als Fenster zur Welt.

Amri Wandel (Jerusalem) greift die viel gestellte Frage auf, wie viele Menschen denn eigentlich Esperanto sprechen. Dass eine Zweitsprachgemeinschaft schwer in Zahlen zu fassen ist, weiß die Interlinguistik seit langem. Die früher übliche Methode, die Mitgliederzahlen der vielen Esperanto-Verbände zugrunde zu legen, ist im heutigen Zeitalter schwindenden Interesses am Vereinsleben immer weniger zuverlässig. Wandel hält daher die Teilnehmerzahlen einschlägiger Gruppen in den sozialen Medien für heute wesentlich aussagekräftiger. Er bereinigt und extrapoliert diese Zahlen und gelangt zu einer überschlägig berechneten Summe von etwa 2 Millionen Esperanto sprechender Internetnutzer. Hinzu kommen Menschen, die über Internetzählungen nicht erfasst werden. Hier schätzt Wandel eine deutlich höhere Zahl als in den sozialen Medien allein. Wandels Berechnungen sind sicherlich keine Volkszählung, aber sie geben immerhin einen ungefähren Wert.

Krunoslav Puškar (Zagreb) berichtet über eine soziolinguistische Befragung unter Sprechern des Esperanto in Kroatien, wo die Zeitschrift *Indecs* erscheint. Seine Informantenbefragung sucht nach Einstellungen und richtet sich einerseits auf das Sprachsystem und andererseits auf die Zukunftsperspektiven der Esperanto-Bewegung. Da eine Zweitsprachgemeinschaft wie die des Esperanto viele sprachlich bewusste Mitglieder hat, vertieft Puškars Erhebung die Berechnungen Wandels. Während Wandel nur nach der Anzahl

der Sprecher fragt, untersucht Puškar die Selbsteinschätzung der Sprachbeherrschung, die Einstellungen zu grammatischen Merkmalen der Sprache und die Haltung zur Zukunft der Sprache.

Der vierte Fragenkreis, die Ausstrahlung der Interlinguistik auf das wissenschaftliche Umfeld, beschäftigt zwei der Autoren. Die Entwicklung der Plansprachen und ihre wissenschaftliche Erfassung bergen viele Erkenntnisse, aus denen andere Praxisfelder und Wissenschaftsdisziplinen etwas lernen können. Hierzu zählen heute aktuell die bürgernahe Sprache für die Kommunikation zwischen Behörden und Bürgern, die Leichte Sprache für Menschen mit Sinnesbehinderungen und die regulierten Sprachen der technischen Fachkommunikation (Schubert 2016). In seinem Aufsatz bespricht Humphrey Tonkin (Hartford) eines dieser Felder, die Sprachplanung. Man vergleiche hierzu Suchowolec (2017), die Plansprachen, Sprachplanung, Terminologiestandardisierung und regulierte Sprachen in ein einheitliches theoretisches Modell bringt. Tonkin geht neben der Sprachplanung auch kurz auf die Terminologiestandardisierung ein, indem er Wüster zitiert, auf den ja auch der Terminus *Plansprache* zurückgeht. Schließlich weist Tonkin auch darauf hin, dass die hundertfünfundzwanzigjährige Sprachentwicklung des Esperanto im Spannungsfeld zwischen Lenkung und sozialer Zufälligkeit eine sehr komplexe Angelegenheit ist.

Detlev Blanke (Berlin), der Nestor der modernen Interlinguistik, versucht, die Erkenntnisse, Befunde und Methoden der Interlinguistik auch außerhalb der eigenen Disziplin nutzbar zu machen. Er beklagt die Tendenz englischsprachiger Autoren, nur englischsprachige Literatur wahrzunehmen, und auch die Neigung anderer Wissenschaftler außerhalb der Interlinguistik, den enorm großen Schatz an Forschungsliteratur, die auf Esperanto und in geringerem Umfang in anderen Plansprachen publiziert ist, einfach zu übersehen. In einer thematisch sorgfältig strukturierten Übersicht zeigt Blanke, wie und wo interlinguistische Literatur zu finden ist, was die Hauptuntersuchungsobjekte sind und in welche Disziplinen ihre Ergebnisse nutzbringend hineinwirken können.

Das Themenheft der Zeitschrift *Indecs* zeigt einen aktuellen Querschnitt der wissenschaftlichen Erfassung des Phänomens Esperanto in linguistischer, soziologischer und historischer Sicht. Den beiden Herausgebern Veronika Poór und Humphrey Tonkin ist zu dieser gelungenen Arbeit zu gratulieren.

Literatur

Eco, Umberto. 1968. *La struttura assente*. Milano: Bompiani. Bearbeitete Übersetzung von Jürgen Trabant: Umberto Eco (1985): *Einführung in die Semiotik*. 5. Aufl. München: Fink.

Hengeveld, Kees; Mackenzie, J. Lachlan. 2008. *Functional Discourse Grammar*. Oxford u.a.: Oxford University Press.

Schubert, Klaus. 2006. Maschinelle Übersetzung mit Dependenzgrammatiken. **In:** Ágel, Vilmos; Eichinger, Ludwig M.; Eroms, Hans-Werner; Hellwig, Peter; Heringer, Hans Jürgen; Lobin, Henning (Hg.): *Dependenz und Valenz / Dependency and Valency*. Halbband 2, pp. 1129–1157. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 25.2.) Berlin; New York, NY: de Gruyter.

Schubert, Klaus. 2014. Barrierefrei, reguliert, gelenkt. Prinzipien optimierenden Eingreifens in Sprache und Kommunikation. **In:** Jekat, Susanne J.; Jüngst, Heike Elisabeth; Schubert, Klaus; Villiger, Claudia (Hg.): *Sprache barrierefrei gestalten*, pp. 201–220. (TransÜD 69). Berlin: Frank & Timme.

Schubert, Klaus. 2015. Word-formation and planned languages. **In:** Müller, Peter O.; Ohnheiser, Ingeborg; Olsen, Susan; Rainer, Franz (Hg.): *Word-formation*. Teilband 3, pp. 2210–2225. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 40.3.) Berlin; Boston: De Gruyter Mouton.

Schubert, Klaus. 2016. Barriereabbau durch optimierte Kommunikationsmittel: Versuch einer Systematisierung. **In:** Mälzer, Nathalie (Hg.): *Barrierefreie Kommunikation – Perspektiven aus Theorie und Praxis*, pp. 15–33. (Kommunikation – Partizipation – Inklusion 2.) Berlin: Frank & Timme.

Suchowolec, Karolina. 2017. *Sprachlenkung*. Berlin: Frank & Timme.

Zuijlen, Job M. van. 1992. Complexiteit en automatisch vertalen. **In:** Alkemade, M. J. A. (Hg.): *Inspelen op complexiteit: mens, techniek, informatie en organisatie*, pp. 220–228. Alphen aan den Rijn: Samson Bedrijfsinformatie.

Klaus Schubert war Soziolinguist an der Universität Kiel, Computerlinguist und Projektleiter im Softwareunternehmen BSO/Buro voor Systeemontwikkeling BV, Abteilung BSO/Research, in Utrecht (Niederlande), Berater bei BSO/Language Technology BV in Baarn (Niederlande) sowie Professor für Sprachdatenverarbeitung und Technikübersetzen an der Fachhochschule Flensburg. Er ist heute Professor für Angewandte Linguistik/Internationale Fachkommunikation an der Universität Hildesheim.

Postanschrift: Universität Hildesheim
Institut für Übersetzungswissenschaft und Fachkommunikation
Universitätsplatz 1, DE-31141 Hildesheim
E-mail: ⟨klaus.schubert@uni-hildesheim.de⟩
URL: www.klausschubert.de/; www.uni-hildesheim.de/index.php?id=schubert

Eingegangen 2016-07-20
Zur Veröffentlichung angenommen 2016-08-16

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 23–30

Recenzo pri nova eldono de studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto verkita de Ulrich Lins

Leif Nordenstorm

Recenzo de la verko
Lins, Ulrich. 2015. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. 375 pp.

Enkonduko

La recenzata verko havas sian historion. Ĝia unua eldono estis broŝuro publikigita en 1973 de la eldonejo l'omnibuso en Kioto. Unu jaron poste ĝi aperis kiel ĉapitro 21 en la verko *Esperanto en perspektivo* (Lapenna k.a. 1974). En 1975 aperis traduko en la japanan fare de Kurisu Kei kaj publikigita de la prestiĝa eldonejo Iwanami en Tokio. Ĝi eldoniĝis kiel memstara verko en Esperanto (1988a), tradukiĝis kaj eldoniĝis en la germana (1988b), la itala (1990b), la rusa (1999), la litova (2005) kaj la korea (2013). En 2015 aperis nova reviziita eldono, kies angla traduko baldaŭ estos eldonita.

Estas normala afero ke sciencaj verkoj aperas en reviziita eldono, ĉar la scienco progresas. En tiu ĉi okazo la progreso dependas de plifaciligita aliro al arĥivoj en la unuigita Germanio kaj en la ekssoveta Rusio post la politikaj ŝanĝiĝoj en Eŭropo en 1989–1990.

La verkinto Ulrich Lins estas historiisto kiu studis historion, politikan sciencon kaj japanologion kaj kiu doktoriĝis per disertaĵo pri la historio de la nova japana religio Oomoto, kies anoj en du periodoj estis persekutataj fare de la japana ŝtato.

Frua suspekto kontraŭ la nova lingvo

En la ĉapitro "Suspekto kontraŭ la nova lingvo" la aŭtoro traktas ĉefe la malfacilaĵojn eldoni la revuon *La Esperantisto*, kies plej multaj abonantoj loĝis en

cara Rusio, lando kun strikta cenzuro.[1] Ankaŭ en okcidento ekzistis suspekto kontraŭ la nova lingvo. Menciiĝas ekzemple citaĵo el la berlina *Deutsche Tageszeitung* el 1907 kie la germana lingvo estas nomata "naturkreskaĵo" kaj Esperanto "trompaĵo" kaj "elpensaĵo de duon-aziano". Alia grava temo en la unua ĉapitro estas Esperanto en la Ligo de Nacioj. En decembro 1920 dek unu delegitoj el la sama nombro de landoj prezentis en la Unua Ensembleo proponon ke "la ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado". La propono renkontis akran proteston de Gabriel Hanoutaux, franca delegito, kiu postulis "honoron" por sia lingvo, la franca. Tio ĉi kompreneble ne estas ekzemplo de persekuto kontraŭ esperantistoj, sed ekzemplo de mallogika argumentado kontraŭ Esperanto.

"Lingvo de judoj kaj komunistoj"

La dua ĉapitro en la verko traktas la evoluon en Germanio. Jam en la tempo de la respubliko de Weimar, 1919–1933, troviĝis bastionoj malamikaj al Esperanto, ekzemple la lingvo-purisma *Allgemeiner deutscher Sprachverein* (Ĝenerala Germana Lingvo-Unuiĝo). Pli danĝera malamiko estis la nacisocialistoj. La origino de ilia malamikeco estis la juda deveno de la lingvo. La esperantistoj komence nur kun malestimo ignoris la atakojn kontraŭ Esperanto, bazitaj sur rasa malamo. Tiu ĉi malamo plurloke formuliĝis de Adolf Hitler en lia verko *Mein Kampf* (Mia batalo).

Tuj post la ŝtatrenverso en 1933, nazioj malpermesis Germanan Laboristan Esperanto-Asocion (GLEA). Germana Esperantoi-Asocio (GEA) jam invitis Universalan kongreson okazontan somere en 1933 en Köln. La kongreso okazis kun 900 partoprenantoj. La nazia urbestro salutis la kongreson en bruna ĉemizo, tute prisilentante Esperanton. GEA dum kelkaj jaroj balancis inter esperantaj idealoj kaj obeo al la aŭtoritatoj ĝis ĝi fine estis malpermesita en 1936. Lins konstatas ke "Ĝian ripetadon de naziaj sloganoj kaj oportunismon ni devas fakte atribui malpli al specifa naziemo de GEA, ol alta grado de politika blindeco — sekvo de multjara tradicio ignori la politikajn implicojn de la laboro por Esperanto" (pp. 96–97). Cetere, inter 1933 kaj 1936 ekzistis ankaŭ *Neue Deutsche Esperanto-Bewegung*, kiu estis tute obeema al la aŭtoritatoj.

[1] La revuo nomiĝis *Esperantisto* ekde n-ro 4, 1892. En 1894 Zamenhof publikigis projekton pri reformita Esperanto, en kiu la difinita artikolo malaperis. La reformprojekto estis malakceptita de la voĉdonantoj.

La agado de esperantistoj en Germanio tamen ne ĉesis. Laboristaj kaj precipe komunistaj esperantistoj helpe de Esperanto organizis reziston. En la koncentrejo Börgermoor oni eĉ organizis sekretan Esperanto-kurson, kiu servis ankaŭ kiel forumo por politikaj diskutoj.

Ekzistas pluraj ekzemploj ke oni arestis aŭ murdis esperantistojn en la nazia Germanio kaj en ĝiaj okupaciitaj teritorioj. En Düsseldorf oni en marto 1935 arestis 36 personojn, inter kiuj estis 29 esperantistoj. En koncentrejoj oni murdis i.a. la tri idojn de Lazaro Ludoviko Zamenhof, Lidia, Zofia kaj Adam. Petr Ginz, ĉeĥa judo kaj denaska esperantisto pereis nur 16-jara.[2] En la okupaciitaj landoj la situacioj estis malsamaj. En Francio ne okazis malhelpoj kontraŭ la Esperanto-movado. En Norvegio kaj Danio la movado daŭre funkciis. En ĈeĥioĈeĥio la movado tamen likvidis sin. Ankaŭ en neokupaciita Portugalio la diktatoro Salazar imitis Hitleron kaj malpermesis la movadon ĝis la portugala revolucio en 1974.

En la libro menciiĝas ankaŭ aliaj landoj, en kiuj la Esperanto-movado dum ia periodo spertis malfacilaĵojn, ekz. Hispanio, Italio, Hungario, Bulgario, Koreio kaj Japanio.

"Lingvo de etburĝoj kaj kosmopolitoj"

En la ĉapitro "Lingvo de etburĝoj kaj kosmopolitoj" la aŭtoro priskribas la evoluon de Esperanto en Sovet-Unio. Post la rusa revolucio la Esperanto-movado prosperis en la lando. La registaro senkoste disponigis "Domon Esperanto", al la movado. Ĝi antaŭe estis palaco de riĉulo. En 1918–1919 troviĝis Esperanto-grupoj en cent lokoj en Rusio. La demando pri internacia lingvo estis diskutata ankaŭ en la Tria Internacio aŭ Kominterno (fondita de Lenin en 1919). En ĝi agis personoj kiuj subtenis Idon, kio aktivigis la esperantistojn. Fine montriĝis ke Kominterno oficiale volis subteni nek Esperanton nek Idon.

La sovetaj esperantistoj en Sovetrespublikara Esperantista Asocio (SEU) dekomence havis bonajn rilatojn kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj multaj sovetianoj membris en ambaŭ organizaĵoj. Sovetaj delegitoj partoprenis en la kongresoj de SAT ĝis 1929, post kio la rilatoj inter SEU malboniĝis.

Korespondado inter sovetaj kaj alilandaj esperantistoj siatempe vekis grandan atenton. En la 1920-aj jaroj ĝi fariĝis grava institucio. Jen unu ekzemplo: En la urboj Minsk kaj Smolensk dum ok monatoj estis senditaj al eksterlando po ĉ. 2 000 leteroj en Esperanto. Leteroj de eksterlandanoj en

[2] Pri Peter Ginz temas la libro Pressburger (2005).

Esperanto estis tradukitaj al la rusa kaj al aliaj lokaj lingvoj kaj centoj da ili estis publikigitaj en sovetiaj gazetoj. Pli kaj pli ofte venis eksterlandaj Esperanto-parolantaj laboristoj por viziti siajn sovetajn korespondantojn. La ideo estis ke la sovetaj laboristoj priskribu la progreson de Sovetio kaj ke la alilandaj laboristoj rakontu pri siaj laborkondiĉoj kaj pri la persekutado de la laborista movado. La organizantoj de la korespondado admonis ke oni ne skribu pri bagatelaĵoj, kio aludis al ĝenerale amikecaj korespondado pri familia situacio, interŝanĝado de poŝtmarkoj k.t.p. La korespondado kaŭzis ankaŭ populariĝon de Esperanto. En 1929 brita ĵurnalistino raportis ke troviĝas 16 000 esperantistoj en Sovet-Unio kaj ke post la angla, germana kaj franca Esperanto okupas la kvaran lokon en lernejoj. La korespondado tamen ne ĉiam evoluiĝis laŭ la deziro de la soveta ŝtato. Kelkaj korespondantoj komprenis ke la kondiĉoj por la laboristoj kelkfoje estis pli bonaj en la kapitalisma okcidenta Eŭropo ol en Sovetio. Sekvis akuzoj pri mensogoj kaj pri misuzo de Esperanto. Oni pli kaj pli forte klopodis reguligi la enhavon de la leteroj senditaj de sovetaj korespondantoj. Dum la 1930-aj jaroj eksterlandaj esperantistoj ĉiam malpli ofte ricevis respondojn al aziaj leteroj. Oni havis la impreson ke Esperanto en Sovetunio endormiĝis. En 1936 ĉesis la esperantlingvaj radioelsendoj el Minsko kaj en 1937 tiuj el Leningrado. Tio ĉi estis unu plia signo ke Esperanto ne povis plu ludi ian oficialan rolon en la ĉiam pli diktatoreca stalintempa Sovet-Unio.

Eksterlandaj esperantistoj rimarkis ke la soveta movado silentiĝis. Samtempe, ekde 1937, okazis arestado kaj mortigado da dekoj, centoj aŭ miloj de sovetaj esperantistoj. La nombron ni ne scias. Dokumentoj montras ke ekzemple esperantistoj, filatelistoj kaj aliaj personoj, kiuj havis personajn kontaktojn kun eksterlandanoj apartenis al unu el dek kvar kategorioj, priskribitaj kiel “kontraŭrevoluciaj kaj socie fremdaj elementoj”.

Granda parto de la ĉapitro pri la situacio en Sovet-Unio temas pri nacipolitiko. Sovet-Unio estis socio kun pli ol cent diversaj naciecoj. Unu teorio estis ke la naciecoj iom post iom kunfandiĝos en novan. Laŭ Lenin ne estis loko por Esperanto kiel monda lingvo. Li opiniis ke la rusa fariĝos la kvara monda lingvo apud la angla, germana kaj franca lingvoj. Stalin tamen iam diris ke estontece ekestos nova planlingvo. Ankaŭ la lingvisto Nikolaj Marr (1864/1865–1934) opiniis ke internacia lingvo estis kreota. Ekde 1950 la situacio ŝanĝiĝis. Marr daŭre argumentis ke aperos nova lingvo per kunfandiĝo de aliaj. Stalin, male, asertis ke la rusa lingvo ĉiam venkis kontraŭ aliaj lingvoj kaj tial ankaŭ venkos estontece. Tiu interveno de Stalin malebligis revenon de Esperanto en la publikan medion en Sovet-Unio kaj ankaŭ en aliaj orienteŭropaj ŝtatoj.

Post la morto de Stalin en 1953 fondiĝis Mondpaca Esperantista Movado, per kiu esperantistoj ankaŭ en orienta Eŭropo povis organiziĝi por "utiligi Esperanton serve al paco kaj reciproka kompreno inter la popoloj". Iom post iom Esperanto-movadoj povis organiziĝi en orienteŭropaj landoj. En kelkaj ili fariĝis multnombraj, kio impresis al okcidenteŭropaj esperantistoj. Abunda libroeldonado i.a. en Hungario helpis al sovetaj esperantistoj havigi librojn. I.a. ruzo estis necesa. Hungara Esperanto-Asocio sukcesis eksporti la romanon *La verda koro* de Julio Baghy (1891–1967) al la sovetia libro-importa entrepreno asertante ke ĝi "priskribas la heroan batalon de la Ruĝa Armeo kontraŭ la imperiismaj invadintoj". Dum la breĵneva tempo tre aktiva kaj poresperanta estis Sovetia Esperantista Junulara Movado. Ĝia posteulo ekde 1979, Asocio de Sovetaj Esperantistoj, male ŝajnis esti forte kontrolata fare de la aŭtoritatoj.[3]

Konkludo kaj rimarkigoj

La recenzata verko finiĝas per dek paĝoj kun analiza "Konkludo". Grava por la analizo estas la Deklaracio pri Esperanto de Bulonjo ĉe maro en 1905 ke ĉiu rajtas uzi Esperanton laŭ sia plaĉo. La lingvo priskribiĝis kiel "lingvo neŭtrale homa". Ekde tiam — kun kelkaj esceptoj, ekz. la laborista Esperanto-movado — regas la opinio ke la lingvo Esperanto kaj ĝia movado estas "neŭtralaj". Oni tamen ne ĉiam en la sama maniero difinas kio estas "neŭtrala". La neŭtraleco ne malhelpis al la plej multaj esperantistoj subteni idealon de paco kaj pri homa frateco. La neŭtraleco tamen estis unu el la kaŭzoj pro kiu esperantistoj nur malfrue komprenis la danĝeron de la naci-socialisma politiko kaj kial kelkaj esperantistoj eĉ klopodos balanciĝi kaj obei al la naziaj aŭtoritatoj por eble savi la movadon.

Ankaŭ en Sovet-Unio multaj esperantistoj estis adaptiĝemaj, kaj ankaŭ tie tio ne povis savi la movadon. Unu el la malmultaj ekzemploj de personoj kiuj komprenis la danĝeron de la situacio estis juna juristo Ivo Lapenna (1909–1987), kiu en artikolo en la jugoslavia La Suda Stelo en 1937 atakis la falsan komprenon pri neŭtraleco en Esperantujo. Li postulis ke la "principoj de pensolibereco kaj demokrateco" devas akompani la neŭtralecon.

[3]La fakto de la unua eldono de *La danĝera lingvo* en 1988 eldoniĝis ne de UEA sed de la okcidentgermana eldonejo Bleicher eldonejo, ricevas sian klarigon en la dua eldono. UEA ne povis eldoni ĝin, ĉar en la komunismaj landoj ankoraŭ ne estis tute permesite skribi pri persekutoj kontraŭ esperantistoj en la stalina periodo. Se UEA eldonus la libron, tio povus kaŭzi malfacilaĵojn por la rilatoj inter UEA kaj orienteŭropaj Esperanto-organizaĵoj.

Jam la titolo de la libro indikas ke ĝi estas studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, do ne specife kontraŭ esperantistoj. Ĝi do temas ne nur pri persekutado, diskriminacio, enmalliberejigo kaj mortigado de esperantistoj, sed ankaŭ pri la malbona traktado, malhonorigo de la lingvo mem kaj de la ideoj pri paco kaj kompreno, kiuj dekomence estis ligitaj al la lingvo. Tiu malhonorigo estis jam antaŭsigno pri estonta persekutado kontraŭ esperantistoj. Sed tion nur malmultaj homoj komprenis en ĝusta tempo.

La aŭtoro ankaŭ iom komparas la persekutojn fare de nazioj kun tiuj fare de stalinistoj. Li konstatas ke ambaŭ reĝimoj kulpas pri kruelaĵoj kaj teruro en altega grado. Diferenco tamen estis ke en nazia Germanio malmultaj homoj estis mortigitaj unuavice pro sia scio aŭ uzo de Esperanto, kvankam tuj post la okupacio de Pollando gvidaj esperantistoj, inkluzive la familio de Zamenhof, estis arestitaj antaŭ ol komenciĝis la amasmurdado de judoj. Sub Stalin esperantistoj estis murditaj pli multnombre pro sia scio aŭ uzo de Esperanto. Ambaŭ diktatorecaj reĝimoj kredis konspiro-teoriojn kaj flegis ilin fanatike.

La danĝera lingvo estas valora kontribuo al la scienca literaturo pri la historio de Eŭropo en la 20-a jarcento. La nova eldono tre similas al la eldono en 1988. La enhavo tamen estas pli riĉa, ĉar post la falo de Sovet-Unio kaj post la unuiĝo de Germanio, aliro al multaj arĥivejoj plifaciliĝis.

Bedaŭrinde malaperis tuta ĉapitro pri persekutoj en orienta Azio: Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Tajvano. Tio ĉi estas manko en la nova eldono, kvankam iom de la materialo nun troviĝas sub aliaj rubrikoj. En la konkluda ĉapitro ankaŭ forstrekiĝis mencio ke en kelkaj islamaj ŝtatoj de tempo al tempo leviĝas suspektoj kontraŭ Esperanto pro ĝia juda deveno.

Por sciencaj kaj humanismaj motivoj mi dezirus pli sisteman liston de nomoj de mortigitaj esperantistoj. Sur unu nenumerita bilda paĝo ni vidas naŭ portretojn de mortigitaj sovetaj esperantistoj. Tio estas bona komenco. Eble la listo fariĝus tre longa, se oni aperigus kompletan liston de mortigitaj esperantistoj. La aferon komplikigas la fakto ke multaj esperantistoj estis mortigitaj por aliaj kaŭzoj ol sia esperantisteco: judeco, politika agado k.t.p. La tasko tamen restas por estonta esplorado.

La lingvaĵo estas bona. La piednotoj kun referencoj estas en bona ordo. La bibliografio en la fino de la libro tamen nur listigas librojn, ne gazetartikolojn aŭ referencojn en interreto. En scienca verko bibliografio normale listigas ĉiujn referencojn, sed tio kompreneble plidikigus la libron. Ni menciu ankaŭ la kovrilon, faritan de Francisco L. Veuthey, kiu estas alloga kaj kiu ankaŭ atestas pri la seriozeco de la libro.

Kvankam *La danĝera lingvo* jam aperis en pluraj eldonoj, ĝi ne finas la esploradon pri persekuto kontraŭ Esperanto. Restas ankoraŭ multaj taskoj por esploremuloj. Mi mencios du. (Jam menciita estas la tasko listigi mortigitajn esperantistojn.)

Unu tasko estas kolektado de buŝaj aŭ skribaj memoroj pri okazaĵoj. Mi donos al vi unu ekzemplon. Mi naskiĝis en Kiruna en Laponio en norda Svedio. Dektrijara mi ekstudis Esperanton. Virino, konatino de mia familio, kiu originis de nia najbara urbo Narvik en norda Norvegio, tiam rakontis al mi ke dum la dua mondmilito iu parenco ŝia, esperantisto, estis en sia hejmo. Iu sonoris sur la pordo. Tie staris germana soldato, okupacianto. Montriĝis ke li estis esperantisto kaj simple volis renkonti lokan esperantiston en Narvik. La parenco havis tre miksitajn sentojn pri tiu vizito. La gasto estis soldato en la okupacianta armeo — do malamiko. Samtempe li estis esperantisto kiu kuraĝis viziti lokan esperantiston, kvankam Esperanto estis malpermesata en lia hejmlando — do amiko. Laŭ mia scio tiu ĉi rakonto neniam antaŭe estis skribe fiksita. Tial mi nun aldonas ĝin por konservi ĝin por la estonteco.

Alia tasko estas pluesplorado pri jam kolektita materialo en arĥivoj. Lins mencias la retejon `www.abark.se` . Ĝi apartenas al *Arbetarrörelsens arkiv*, la arĥivejo de la laborista movado en Svedio. En tiu arĥivo ekzistas ekzemple manuskriptoj kun rakontoj de multaj laboristoj kiuj vizitis Sovet-Union, kaŭze de korespondado en Esperanto. Ĝi povos doni utilegajn informojn.

Referencoj

Lapenna, Ivo; Lins, Ulrich; Carlevaro, Tazio. 1974. *Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo.* Londono; Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio; Centro de esplorado kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo. xxxii + 844 pp.

Lins, Ulrich. 1973. *La danĝera lingvo. Esperanto en la uragano de persekutoj.* Kioto: l'omnibuso. 67 pp.

Lins, Ulrich. 1974. Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo. **En:** Lapenna et al. (1974:697–747).

Lins, Ulrich. 1975. *Kiken na gengo. Hakugai no naka no esuperanto.* Tradukita de Kurisu Kei. Tokio: Iwanami. v + 261 pp. Traduko en la japanan de Lins (1973).

Lins, Ulrich. 1988a. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto.* Gerlingen: Bleicher. 546 pp.

Lins, Ulrich. 1988b. *Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin.* Gerlingen: Bleicher. 326 pp.

Lins, Ulrich. 1990a. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto.* Dua eldono. Kun postparoloj de Detlev Blanke kaj Sergej Kuznecov. Moskvo: Progreso. 568 pp.

Lins, Ulrich. 1990b. *La lingua pericolosa. Storia delle persecuzioni contro l'esperanto sotto Hitler i Stalin*. Tradukita de Giordano Formizzi; Giorgio Barelli. Piombino: TraccEdizioni. 382 pp. Traduko en la italan de Lins (1988a).

Lins, Ulrich. 1999. *Опасный язык. Книга о преследованиях эсперанто*. Tradukita de Viktor Arolovič; Lev Vul′fovič; Ludmila Novikova. Moskvo: Prava čeloveka, Impeto. 574 pp. Traduko en la rusan de Lins (1988a).

Lins, Ulrich. 2005. *Pavojingoji kalba. Esperantininkų persekiojimai*. Tradukita de Vytautas Rinkevičius. Vilnius: Moslo ir enciklopedijų leidybos institutas. 462 pp. Traduko en la litovan de Lins (1988a).

Lins, Ulrich. 2013. *wiheomhan eoneo*. Seulo: Galmuri. 628 pp. ISBN 978-89-6195-073-2. Traduko en la korean de Lins (1988a) fare de Choi Man-won.

Pressburger, Chava. 2005. *Taglibro de mia frato. Memornotoj de Petr Ginz el la jaroj 1941–1942*. Dobřihovice: KAVA-PECH.

Leif Nordenstorm estas direktoro de la pastra kursejo *Fjellstedtska skolan* en Upsalo. Li estas pastro en la Sveda eklezio kaj lekciisto pri religihistorio en la Teologia instituto Johannelund en Upsalo. Li naskiĝis en 1960 kaj doktoriĝis en 2002 pri teologio kun disertaĵo pri la japana nova religio Oomoto. Li estas bakalaŭro pri la rusa lingvo kaj orienteŭropa historio.

Oficeja adreso de la aŭtoro: Stiftelsen Fjellstedtska skolan, Linnégatan 1 D,
SE-753 32 Uppsala, Svedio.

Retpoŝta adreso: ⟨leif.nordenstorm@fjellstedtska.se⟩

Ricevita 2016-11-04
Akceptita por publikigo 2016-11-23

Aldono 2018-02-25 fare de la redaktoro

Lins, Ulrich. 2016. *Dangerous Language — Esperanto under Hitler and Stalin*. Traduko en la anglan fare de Humphrey Tonkin, XVIII + 299 pp. Basingstoke: Palgrave Macmillan. ISBN 978-1-137-54916-7.

Lins, Ulrich. 2017. *Dangerous Language — Esperanto and the Decline of Stalinism*. Traduko en la anglan fare de Humphrey Tonkin, XIX + 198 pp. Basingstoke: Palgrave Macmillan. ISBN 978-1-352-00019-1.

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 31–36

Michel Duc Goninaz — esperantologo revizianta naivecon de la esperantista racio

Ilona Koutny & Zbigniew Galor

> Kredi, ke esperanto povas iel "venki" sen gravegaj revoluciaj ŝanĝoj en la sferoj ekonomia, socia, politika, estas naive.
> Michel Duc Goninaz (2004)

1. Enkonduke: ne nur PIV

Michel Duc Goninaz tiel prezentis sin koncize en 2004 (ni uzos partojn de la "kontrolata monologo" de Michel en pluraj lokoj):

> Naskita la 6an de septembro 1933 en Parizo. Esperanton mi lernis ekde la jaro 1946 en gimnazio. Post studado en la Pariza Instruista seminario (École Normale d'Instituteurs), mi studis ekde 1954 en la Supera Pedagogia Instituto (École Normale Supérieure) kaj en Sorbono la francan filologion kaj literaturon kaj komencis studadon de la rusa lingvo, por kiu mi poste fakiĝis. En 1956–57 mi studis en la Moskva Universitato. Mi instruis la rusan lingvon unue en mezlernejoj Parizregionaj kaj ekde 1967 en la Universitato de Provenco (Aikso) ĝis mia emeritiĝo en 1996. Ankaŭ esperanton mi instruis en la sama universitato de 1970 ĝis 1996. Kiel sciate, mia ĉefa laboro sur la esperantologia tereno dum la pasinta jardeko estis la revizio de PIV. (Duc Goninaz 2004)

Efektive tiu laboro, kiun li plenumis laŭ la mendo de la Plenum-Komitato de SAT kaj la peto de Gaston Waringhien, ĉeestis en lia vivo ĝis lia morto, ĉar post la apero de la nova versio de PIV en 2002, la NPIV, sekvis denovaj kontroloj, korektoj (pri laboroj PIV vd. la artikolon de Claude Roux ĉi-numere) ĝis kiam la grava verko aperis ankaŭ rete (`http://vortaro.net`). La laboro mobilizis multajn esperantistojn. Ankaŭ ni kontribuis: Ilona per la revizio de lingvistikaj terminoj kaj Zbigniew per tiu de sociologiaj. Michel ĉiam emfazis, ke temas pri revizio kaj ne pri nova vortaro. Fakte, nova vortaro bezonus esencan eluzon de tekstaroj, kiuj donas informojn pri la lingvouzo de esperantistoj; ja por ili esperanto kutime ne estas denaska lingvo.

Lia leksikografia laboro komenciĝis jam pli frue, per esperanto-franca temvortareto (*Vocabulaire Esperanto* 1971, 1990, Éditions Ophrys), kiu en 45 temgrupoj kolektas ĉ. 4 000 vortojn kun aldonaj esprimoj. Li komencis labori ankaŭ pri la franca parto de la *Etvortaro pri lingvo kaj komunikado* de Ilona Koutny (2003, 2008).

Se ni kompletigas la supran vivoskeleton, aperas multflanka personeco de Michel Duc Goninaz: krom leksikografo: lingvisto, literaturisto, lingvoinstruisto, tradukisto kaj sentema homo por la socia-movada flanko. Komence de sia kariero li kontribuis al la kabaredo de Raymond Schwarz kaj rolis en la esperanta filmo *Angoroj* (1964) de Jacques-Louis Mahé. Li konservis sian specialan humoron dum la tuta vivo. Li estis multflanka esperantisto: ĉu ideala, ĉu tipa esperantisto kiu bone konas la esperantan kulturon (kaj tie ĉi ni ne intencas diskuti kun Aleksandro Melnikov kiu estas tipa esperantisto), ĉu iu speciala.

2. Lingvisto multflanka

Michel Duc Goninaz estis docento de la rusa lingvo kaj esperanto en la universitato de Aix-en-Provence (suda Francio). Li ne nur gvidis esperantokursojn dum 26 jaroj, sed konsciis, ke estas grave prezenti esperanton al la lingvista mondo; li regule kontribuis al la lingvistikaj eldonaĵoj de la universitato per franclingvaj artikoloj pri la priskribo, strukturo, semantiko de esperanto kaj ĝia socilingvistika flanko, pri la slavaj influoj al esperanto. Li verkis france pri la leksikografiaj problemoj de esperanto por la speciala numero de la revuo *Interface* (redaktita de Klaus Schubert 2001) kaj ankaŭ pri la rolo de lingvoj en la epoko de tutteriĝo por la pollingva libro redaktita en la poznana Agrikultura Universitato (estinta laborejo de Zbigniew kaj laŭ ties instigo). Redaktis la gravan plurlingvan lingvistikan libron *Studoj pri la internacia lingvo* (AIMAV 1987) kun kontribuoj de Jerzy Leyk, Ulrich Lins, David L. Gold, Richard E. Wood, Pierre Janton, Ryszard Rokicki, István Szerdahelyi, Claude Piron kaj li mem).

Li okupiĝis pri multaj problemoj de esperanta gramatiko, de fonetiko ĝis pragmatiko, de la normo ĝis socilingvistikaj problemoj (vd. liston de liaj publikaĵoj ĉe `edukado.net/biblioteko/panteono`). Li idealigis nek la lingvon, nek ĝian komunumon, sed analizis ilin per sciencaj metodoj. Li montris la arbitrecon de esperanta leksiko (*fervojo, terpomo, necesejo* k.t.p.), t.e. ĝian funkciadon similan al tiu de naturaj lingvoj (Duc Goninaz 2011).

Specialan atenton meritas lia traktado de la radikkaraktero (2009), kie li kontraŭe al la opinio de la Akademio de Esperanto, kies membro li estis,

rifuzas la tradician aliron pri gramatika karaktero de radikoj, prezentante la problemon en pli larĝa semantika kunteksto, kie la radikkaraktero ne solvas la problemon, ekzemple *juĝisto* sed *advokato*; *emerito* sed *pensiulo*; eblus daŭrigi per *dissolvi* kaj *evoluigi*. Li konstatis, ke "por la kombineblo de morfemoj, decida estas la signifo de ĉiu morfemo, kaj la signifoj ne lasas, ke oni katenu ilin per gramatikaj elpensaĵoj". Tiel li reprenis la problemon pri kiu batalis ankaŭ Szerdahelyi kaj signalas ĝian aktualecon pri kio AdE devus repensi sian aliron. Mi samopinias kun li, ke la "leksikaj unuoj prezentas do interpretojn de la socia sperto en semantikaj kampoj" (Duc Goninaz 2011).

Li vizitis plurfoje la Esperanto-fakon de ELTE en Budapeŝto kaj gvidis diskutovekan kurson pri esperanta gramatiko kadre de la Interlingvistikaj Studoj de UAM (`http://www.amu.edu.pl/~interl/`).

3. Literaturo kaj tradukado

Lin altiris ankaŭ la literaturo: Michel verkis unu teatraĵon "La ŝtona gasto" kiun prezentis la franca trupo TESPA, kaj tradukis kelkajn francajn romanojn (Camus: *La Fremdulo*; Radiguet: *Kun diablo en la korpo*), francajn kanzonojn (kiujn kantis Jadwiga Dzięgielewska, Ĵak Le Puil, Jacques Yvart) kaj erotikajn poeziaĵojn por la franca revuo Kancerkliniko, kies konstanta kunlaboranto li estis dum multaj jaroj ("El la taglibro de nekuracebla optimisto"). Li verkis ankaŭ eseojn pri literaturo ("La poezia verkaro de Gaston Waringhien" 1994).

4. Ekstere de UEA – en la centro de e-movado

La socia kaj lingvopolitika flankoj de la movado estis same grava por Michel. Jam en 1974 aperis lia teksto de SUK (Somera Universitata Kurso) pri *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko*. Li esploris ĝian socian statuson: *La socia statuso de Esperanto: tri historiaj teorioj (Zamenhof, Lanti, Lapenna) konfronte al la nuna realo* en 1985 kaj *Kiu(j) lingvo(j) por kia Eŭropo? Eŭropa Unio hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ: lingvaj kaj kulturaj aspektoj* en 2011 (Sarajevo, pp. 15–20). Li estis recenzanto de la libro de Zbigniew kaj Jukka Pietiläinen: *UEA en konscio de esperantistoj* (2015).

Por la demando, ĉu la Esperanto-movado estas en krizo, li respondis sekve:

> Mi ne estas kompetenta por analizi la t.n. "Esperanto-movadon". Necesus unue ĝin difini. Probable sociologo povus pli bone ol mi respondi al tiu demando. Mi havas la impreson, ke la Esperanto-movado estas en krizo de post sia naskiĝo. Se temas pri la internaj problemoj de iuj organizaĵoj, mi ne opinias, ke tio

> povas misinflui la tutan esperantistaron. Se temas pri la fakto, ke multaj novaj esperanto-uzantoj ne emas partopreni en la tradiciaj asocioj, mi dirus, ke tio estas grava fenomeno, antaŭvidebla jam de kelkaj jardekoj. Sed probable tio estas komenco de nova epoko, kaj mi vidas nenian kialon por pesimismi. Mi precipe ne vidas kialon por imagi, ke iu jam elpensita nova organiza formo povus stafeti en tia evoluo. La novaj manieroj lerni kaj uzi nian lingvon probable naskos, preter la normala nuna individuismo, novajn formojn de homgrupiĝoj kaj kolektivaj agadoj, pri kiuj oni ne povas ukazi. Sed mi opinias, ke la t.n. "fakaj asocioj" devas zorgi ne nur pri sia pluekzistado, sed eĉ pri sia disvolviĝo, ĉar ili ludas gravan rolon en la konkreta uzado de la lingvo kaj en la evoluigo de ĝiaj fakaj terminaroj. (Duc Goninaz 2004)

Ĉu esperanto povas esti (la?) lingvo de EU? Lia respondo:

> Evidente ne, laŭ mia prognozo. EU estas kreaĵo de ŝtatoj, kun ĉiuj konsekvencoj de tiu situacio, interalie la daŭrigo en ĝi de la lingvobatalo kaj de la lingva imperiismo. Esperanto estas lingvo ne "internacia", malgraŭ tiu ŝablona etiketo, kiun donis al ĝi ties aŭtoro kaj la ĉi-supre aludita "Esperanto-movado". Ĝi estas lingvo "sengenta kaj neŭtrale-homa", kiel Zamenhof preferis ĝin difini. Ĝi estas lingvo destinita al la Bjalistokanoj de la Zamenhofa epoko kaj konsekvence al ĉiuj homoj, ĉar multegaj lokoj de la nuna mondo estas bjalistokoj. Kredi, ke esperanto povas iel "venki" sen gravegaj revoluciaj ŝanĝoj en la sferoj ekonomia, socia, politika, estas naive.

Li tuŝis ankaŭ la politikan rolon de e-movado:

> Vi demandas, kial mi ne protestis kontraŭ la politika neŭtraleco de UEA. Nu, mi ne kutimas "protesti". Protesti signifas, ke oni ankoraŭ ion atendas de la instanco, kontraŭ kiu oni protestas. Sed tio ne signifas, ke mi rilatas indiferente al la historio kaj ideologiaj tendencoj de la esperantistaj organizaĵoj. Vi povis konstati, ke en artikolo, kiun mi verkis por *Sennacieca Revuo* antaŭ pli ol jardeko kiel komenton al *La danĝera lingvo* de U. Lins, mi analizis tre kritike la malneŭtralecon de la esperantistaj organizaĵoj, kiuj paradas per sia "neŭtraleco". [...] En la "Esperanto-movado", nur la Akademio estas neŭtrala pri ĉio, kio ne koncernas la lingvon mem. La diversaj asocioj ne ŝajnigu, ke ili estas neŭtralaj; kiam ili uzas argumentojn por propagandi la lingvon, tiuj argumentoj laŭdifine ne estas neŭtralaj. Kiam la gvidantoj de UEA amindumas kun UN aŭ diversaj registoj (ni memoru ekzemple, ke la hispana ĉefmurdisto Francisko Franko estis "protektanto" la Madrida UK en 1968), ili rompas la proklamitan politikan neŭtralecon de la asocio. [...] La koncepto "neŭtraleco" estas do, en la tiel nomata "neŭtrala" Movado, ofte uzata inverse kaj hipokrite. En la ĉi-supre aludita artikolo, mi esprimis la paradokson, ke SAT estas pli neŭtrala ol UEA, ĉar en ĝiaj kongresoj oni ne vidas ministrojn aŭ ambasadorojn, kaj ke interne de SAT, kiu estas plurtendenca, la plej neŭtralaj estas la anarkiistoj, ĉar ili subtenas neniun ŝtaton aŭ politikan partion.

5. Nia Michel

Michel havis bonajn kontaktojn kun Pollando ekde 1955, kiam li partoprenis la Mondan Festivalon de Junularo kaj Studentoj en Varsovio, kie kolektiĝis ĉ. 150 esperantistoj (Duc Goninaz 2004). Li vizitis iujn SIS-ojn (ekde la 70-aj jaroj Studenta Interlingvistika Seminario, poste Scienca Interlingvistika Simpozio), kie verŝajne ni konatiĝis kun li. (Cetere, ankaŭ ni tie konatiĝis kiel gestudentoj.) Li kontribuis al kursoj de AIS, ekzemple en Krynica kaj Krakovo. Li sukcesis kunligi sciencan aliron kun iu speciala humoro demandosignante esperantajn dogmojn kiel ekzemple logikecon, kaj incitis la tiaman publikon per ruĝa kravato.

Li kun la edzino Arlette, kiu parolas esperante, gastis ĉe ni en Poznano okaze de interlingvistika sesio. Ankaŭ ni gastis ĉe ili kelkfoje en tre amika etoso en Aix-en-Provence, diskutante pri la aferoj de la mondo kaj Esperantio. Ni planis viziton ankaŭ en 2016 ... restis rememoro pri li kaj Detlev dum Arkones (`https://www.youtube.com/watch?v=QMBXdu8u0xY`).

Bibliografio

Duc Goninaz, Michel. 2001. Problèmes lexicographiques de l'espéranto. **En:** Schubert, Klaus, red. *Interface, Planned Languages: From Concept to Reality*, pp. 91–98. Bruselo.

Duc Goninaz, Michel. 2002. Mi estas kontenta ĝenerale ... – intervjuo kun Michel Duc Goninaz (far LOdE). **En:** *La Ondo de Esperanto* 2002/1.

Duc Goninaz, Michel. 2004. Mi ne kutimas protesti – intervjuo kun Michel Duc Goninaz (la monologon kontrolis Zbigniew Galor). **En:** *Pola Esperantisto* 2004/2.

Duc Goninaz, Michel. 2006: Les langues à l'heure de la mondialisation: libération ou aliénation? **En:** Stępień, J., red. *Praca i kapitał spoleczny w procesie budowy społeczeństwa obywatelskiego*, pp. 207–214.

Duc Goninaz, Michel. 2009. Szerdahelyi kaj la "gramatika karaktero de la radikoj". **En:** Koutny, Ilona, red. *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi*, pp. 166–177. Poznano: ProDruk & Steleto.

Duc Goninaz, Michel. 2011. Pri la leksika sistemo de Esperanto. **En:** *IPR*, 2011/1.

Galor, Zbigniew; Pietiläinen, Jukka. 2015. *UEA en konscio de esperantistoj*, 167 pp. Dobřichovice: KAVA-PECH. ISBN 978-80-87169-55-1.

Ilona Koutny naskiĝis en Hungario kaj loĝas ekde 1997 en Pollando; diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, poste doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös Loránd Universitato kaj habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. Ŝi instruis ĉe la Esperanto-fako de Eötvös Universitato. Nun ŝi estas profesoro kaj estras la Ugro-Finnan Katedron de UAM. Ŝi fondis en 1997 kaj gvidas ankaŭ la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn ĉe UAM, kie ŝi prelegadas pri Esperanta lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado, metodiko.

Ŝi okupiĝis pri komputa lingvistiko (parolsintezilo Esparol kaj instruprogramoj), redaktis la Hungaran-Esperantan vortaron (1996; kun István Szerdahelyi), la Hungaran-polan temvortaron (2000; kun koleginoj) kaj tri temvortaretojn kun ekzercoj en Angla-Esperanta-Hungara versio. Esploras pragmalingvistikon kaj la rilaton de lingvo kaj kulturo. Profesoro de AIS.

Paperpoŝta adreso: Universitato Adam Mickiewicz, Interlingvistikaj Studoj,
al. Niepodległośći 4, PL-61-874 Poznań
Retpoŝta adreso: ikoutny@amu.edu.pl.
Retejo: www.amu.edu.pl/~interl/

—

Zbigniew Galor (1952-07-16 — 2017-01-27) estis pola sociologo, universitata profesoro, estro de Katedro pri Ĝenerala Sociologio ĉe la Universitato de Szczecin. Doktoriĝis pri filozofio kaj sociologio kaj habilitiĝis pri sociologio. Preleganto de la Interlingvistikaj Studoj UAM en Poznano, profesoro de AIS (Akademio Internacia de Sciencoj), iama prezidinto de AIS-Pollando kaj de Pola Kooperativa-Esperanto-Organizaĵo. Aŭtoro kaj gvidanto de esplorprojekto: *UEA en konscio de esperantistoj*, kiu aperis libroforme (kun Jukka Pietiläinen). Listo de publikajoj estas trovebla ĉe
http://www.zbigniewgalor.pl/?file=esperanto .

Ricevita 2017-05-26
Akceptita por publikigo 2017-06-07

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 37–41

Michel Duc Goninaz kaj la reviziado de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*

Claude Roux

En 1990 la Plenum-komitato (PK) de la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) petis Michel-on Duc Goninaz entrepreni revizion de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV). Michel unue certiĝis, ke Gaston Waringhien, la ĉefa kunaŭtoro de PIV 1970, aprobas la principon de ĉi tiu revizio sub lia direktado (1991) kaj rilatis kun li por starigi laborplanon. Post la morto de Waringhien, fine de la jaro 1991, Georges Lagrange (1928–1992; kultura centro Kvinpetalo, Bureso, apud Montmoriljono, Francio) konfidis al Michel la ekzempleron de PIV apartenintan al Waringhien, grandvaloran pro ĝiaj marĝenaj korektoj kaj notoj. La unuaj pli ol 350 modifoj de PIV estis do tiuj proponitaj de Waringhien mem. Poste Michel malkovris aliajn jam ekzistantajn korekto-proponojn i.a. en la arkivo de Rolando Levreaud (1919–1992; Saint-André-de-Cubzac, apud Bordozo), ellaborita dum la kompilado de la Suplemento de PIV (1987), kaj en la multaj notoj verkitaj de André Caubel (1904–1977; Marsejlo) dum la jaroj 1970. Sed tiuj ĉi laboraĵoj montriĝis nesufiĉaj: estis ja nepre necese krei ampleksan rondon da reviziantoj, kiu inkluzivu kaj ĝeneralistojn de la lingvo kaj fakulojn pri kiel eble plej granda nombro de fakoj traktitaj en PIV. Pro tio Michel lanĉis pere de SAT alvokon al la Akademio de Esperanto, al la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) de Sanmarino kaj al la respondeculoj de ĉiuj fakaj esperanto-asocioj, el kiuj sufiĉe multaj kunlaboris en la reviziado.

Tiam mi estis kvazaŭ najbaro de Michel (li loĝis en Aikso Provenca, dum mi en Marsejlo) kaj ni de tempo al tempo renkontiĝis ĉe li, i.a. por diskuti pri lia grandioza projekto. En 1994 li petis mian helpon koncerne al la uzo de sia komputilo (Michel ne tute regis ĝin) kaj al la natursciencaj terminoj en PIV. Niaj rilatoj tuj poste iĝis pli kaj pli oftaj precipe koncerne la planadon de la giganta tasko de la reviziado. La unua plej urĝa afero konsistis en la ellaborado de tiparoj (tiam unikodaj tiparoj ne ekzistis) specifaj al Esperanto (ĉapelitaj literoj) kaj al PIV (vinjetoj), kiu okupis min dum du monatoj sub la direktado de Michel, kiu kontrolis, ke ili ja taŭgas por nia celo. Poste necesis skani la 1 213 tekstopaĝojn de PIV 1970 por ricevi tekston redakteblan per

komputilo kaj organizi la korektadon de la rekoneraroj (kiujn postlasis la programo de optika tiprekono), en kiu partoprenis pli ol 20 personoj.

En 1995 komenciĝis la enkomputiligo de la modifoj de PIV. Ĉiu kunlaboranto ricevis la tekston de sia fako (eltirita el la elektronika dosiero *Tuta PIV*) sub formo de elektronika dosiero, por korekti kaj kompletigi ĝin, kvankam kelkaj kunlaborantoj preferis reverki aŭ estis devigataj verki la tutan tekston de sia fako: en PIV 1970 pluraj fakoj de la reviziata PIV (la Nova PIV) estas aŭ tute eksmodaj [ekz. la fako matematiko reverkita de Christer Kiselman (Upsalo) kaj Horst Holdgrün (Gotingeno)] aŭ eĉ malestaj (ekz. la fako komputiko, verkita de Edmundo Grimley Evans). Tiam Michel kunordigis la laboron super la ĝenerala vortaro kaj la sciencoj de la socio, dum mi kunordigis la reviziadon de la fakoj matematiko, natursciencoj kaj teknikoj. Entute kunlaboris ĉ. 90 fakuloj, kies listo troviĝas en PIV 2005 (pp. 18–20), el kiuj ĉ. 20 membroj de la Akademio de Esperanto (AdE), tiel ke nur tre malmultaj fakoj de PIV restis ne reviziataj. La korespondado inter la kunordigantoj kaj la fakaj reviziantoj estis intensa, longedaŭra kaj ege fruktodona. Michel kaj mi regule renkontiĝis por diskuti pri la ŝanĝoj proponitaj de tiu aŭ tiu ĉi kolego, pri la progresado de la laboro, pri la ŝtopendaj breĉoj kaj aliaj punktoj. Ni ambaŭ sidis antaŭ la komputilo de Michel kaj kune korektis (ĉiuj korektoj de PIV estis farataj kune) kaj amike diskutis pri tiu aŭ ĉi tiu faka, redakta aŭ lingva punkto. Michel eltiris el inter la paĝoj de sia ekzemplero de PIV 1970 etajn paperpecojn krajone surskribitajn per koncizaj indikoj de korektado, kiujn ni pridiskutis antaŭ ol ĝisdatigi la dosieron *Tuta PIV*. La labortago ĝenerale finiĝis post la oka vespere (per la savkopio de ĉiuj modifitaj dosieroj), tamen interrompita postagmeze, ĉ. la kvina, de duonhoro da ripozo ĉirkaŭ tablo en la kuirejo, kie ni ricevis manĝeton preparitan de Arlette, la edzino de Michel.

Ĉar sur diversaj kampoj la informoj entenitaj de PIV 1970 estis eksmodaj en la jaroj 1990, la necesaj ŝanĝoj estis ofte gravaj kaj postulis multe da laboro, precipe la ĝisdatigo de la ĝenerala vortaro kaj de la nomoj de teritorioj, la atento al la novaj Oficialaj Aldonoj de AdE kaj la aldono de ties indikiloj en la respondaj vortoj de PIV kaj la korekto kaj aldono de tre multaj artikoloj en la fakoj matematiko, natursciencoj kaj teknikoj. Tial nur fine de 1999 komenciĝis la unua korektado de la teksto de la Nova PIV, poparte sendita al la diversaj reviziantoj kaj al skipo de trideko da ne specialiĝintaj korektantoj (kies listo kuŝas sur paĝo 20 de PIV 2005). Samtempe Michel kaj mi komencis zorgi pri la ilustraĵoj, ĉar tiam nur malmultaj reviziantoj ilustris sian revizion, sed malgraŭ la gravaj kontribuoj de Serge Sire (Sillingy, apud Annecy), pri diversaj fakoj, kaj de la reviziantoj de la fakoj matem-

atiko, konstruteknikoj, botaniko, zoologio kaj biologio kaj fiziologio, nia PIV bedaŭrinde restis nesufiĉe ilustrita. Krome Wolfram Diestel (Lepsiko) kaj Serge Sire perkomputile kontrolis la koherecon de la referencoj de la tuta Nova PIV.

En 2001 okazis la dua vico de korektado samtempe kun la definitiva enpaĝigo, kiun mi faris sub la kontrolo de Michel. En januaro 2002 mi sendis la prespretajn dosierojn al la presisto kaj samjare finfine aperis la Nova PIV, kiun SAT kaj Michel prezentis en la kongreso de SAT en Alikanto. Post pli ol dek jaroj da intensa laboro! Iom poste Michel ricevis la honoran titolon "La Esperantisto de la jaro", aljuĝita de la revuo *La Ondo de Esperanto*.

Ne daŭris longe la ripoztempo! Tre frue venis analizoj kaj kritikoj (vidu ekz-e la recenzon "Heroa verko – kun mankoj" (Wennergren 2002) kaj la analizo *Kritikaj notoj pri la Plena Ilustrita Vortaro 2002 kaj 2005* (Wennergren 2006), ambaŭ de Bertilo Wennergren), kaj diversspecaj korektoproponoj, ĉiuj kiuj devigis nin malfermi novan dosieron, NPIV2, kaj rekomenci la amikajn renkontojn ĉe la komputilo de Michel. Al la antaŭaj reviziantoj aldoniĝis novaj (kompleta listo en PIV 2005, p. 20). En 2003 la PK de SAT proponis al Michel, ke li direktu novan korektitan kaj ĝisdatigitan eldonon, sampaĝan kiel PIV 2002. Por tiu ĉi ni do akceptis nur la korektojn, aldonojn kaj forigojn, kiuj ne notinde modifas la enpaĝigon, do ekskluzivis novajn desegnojn kaj (krom maloftaj esceptoj) aldonojn aŭ forigojn de pli ol du linioj. Pli gravajn necesajn ŝanĝojn ni arigis en apartan dosieron, cele al estonta, iom nebule planita eldono pli ampleksa, kun pli da ilustraĵoj, eble koloraj, kaj kun tute nova enpaĝigo. Dume la stoko de la 2000 ekzempleroj de la Nova PIV rapide malkreskis kaj elĉerpiĝis en 2004, sed Michel kaj mi estis pretaj por la dua eldono, kiu aperis kun la titolo PIV 2005.

Tial ke ĉi tiu eldono pli malrapide disvendiĝis ol la antaŭa kaj ke la korektendaĵoj estis notinde malpli multaj, malpli da streboj estis necesaj por la ĝisdatigo de PIV: Michel dediĉis pli da tempo al la preparo de nova eldono de la fame konata Plena Vortaro (PV), unue aperinta en 1930, kaj mi al la verkado de ampleksa katalogo pri la likenoj en Francio (Roux k.a. 2014). Malgraŭ tio iom post iom progresis la korektado de PIV kaj en 2015–2016 manuskripto pri PIV 2017 estis survoje al finpretigo sur la samaj bazoj kiel tiuj de PIV 2005. Multaj korektoj devenis el proponoj de diversaj korespondantoj, i.a. de Wang Chongfang, kiu, dum sia laborego super la Granda Vortaro Ĉina-Esperanta (Wang 2007), elsarkis multajn eraretojn en la PIV-aj citaĵoj de la Zamenhofa Proverbaro (Zamenhof 1910) kaj de la Biblio (La Sankta Biblio 1990; La Malnova Testamento 1908–1921), fontantajn el PIV 1970 sed preteratentitajn.

Sed, ho ve!, nia komuna laboro abrupte interrompiĝis pro la tute ne atendita forpaso de Michel la 26-an de marto 2016, en la aĝo de 82 jaroj kaj duono. Post paso de la ŝoko pro lia malapero, mi en julio finanalizis la notojn senditajn de Wang Chongfang kaj la enretigitajn Kritikaj notoj de Bertilo Wennergren kaj poste pretigis en oktobro 2016 la prespretajn dosierojn de PIV 2017.

Kian grandan ŝancon mi havis konatiĝi kun Michel kaj partopreni kun li en la granda aventuro de la reviziado de PIV kaj tiel progresi en la lingvo Esperanto danke al liaj valoregaj instruoj, konatiĝi kun dekoj da eksterordinaraj kolegoj kaj ĝisdatigi miajn sciojn pri la natursciencoj spite al mia frua (1972) specialiĝo en likenologio. PIV 2017 estos la lasta eldono samspeca kiel PIV 2002 kaj 2005: nun ne plu eblas plibonigi PIV-on sen drastaj ŝanĝoj en la enpaĝigo kaj en la enhavo. Ĉu estiĝos nova impeto de la esperantistoj por pli ampleksa kaj pli ilustrita, grandparte renovigita PIV?

Bibliografiaj referencoj

Clauzade, Georges A.; Diederich, Paul; Roux, Claude. 1989. *Nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj – Ilustrita determinlibro.* Marsejlo: Soc. linn. Provence (Bull. Soc. linn. Provence, speciala n-ro 1). 142 pp.

Clauzade, Georges A.; Roux, Claude. 1985. *Likenoj de Okcidenta Eŭropo. Ilustrita determinlibro.* Royan: S.B.C.O. (Bull. Soc. bot. Centre-Ouest, speciala n-ro 7). 893 + 2 pp.

Grosjean-Maupin, E. [Émile]; Esselin, A[lbert]; Grenkamp-Kornfeld, S[alomon]; Waringhien, G[aston]. 1971. *Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 511 + 63 pp. (PV)

La Malnova testamento. 1908–1921. (Tradukita el la hebrea de L. L. Zamenhof.) Parizo: Hachette et C^{ie}.

La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. 2002. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 1 265 pp. (NPIV)

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. 1970. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 1 303 pp. (PIV 1970)

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento. 1987. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 45 pp.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2005. 2005. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 1 265 pp. (PIV 2005)

Roux, Claude k.a. 2014. *Catalogue des lichens et champignons lichénicoles de France métropolitaine.* Fougères (Ille-et-Vilaine): Des Abbayes. 1 525 pp.

La Sankta Biblio. Malnova kaj Nova Testamentoj tradukitaj el la originalaj lingvoj. 1990. Londono: Brita kaj Alilanda Biblia Societo; Edinburgo: Nacia Biblia Societo de Skotlando.

Wang Chongfang. 2007. *Granda Vortaro Ĉina-Esperanta*. Ĉina Esperanto-Eldonejo en kunlaborado kun Esperanta Asocio de Guangdong-provinco kaj Esperanta Asocio de Jiangsu-provinco. 1 246 pp.

Wennergren, Bertilo. 2002. Heroa verko – kun mankoj. *Monato* 2002-09. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo. Rete: `http://www.esperanto.be/fel/mon/rec/pivo.html`

Wennergren, Bertilo. 2006. *Kritikaj notoj pri la Plena Ilustrita Vortaro 2002 kaj 2005*. `http://bertilow.com/piv/#novajhoj`

Zamenhof L. L. 1910. *Proverbaro Esperanta laŭ la verko Frazeologio rusa-pola-franca, germana de M. F. Zamenhof*. Parizo: Hachette et C^{ie}.

Claude Roux estas emerita direktisto pri esplorado (fako likenologio) en CNRS (Francia Centro pri Scienca Esplorado), membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), aŭtoro aŭ kunaŭtoro de ĉ. 260 likenologiaj publikaĵoj, el kiuj ĉ. 40 en Esperanto, i.a. determinlibroj pri la likenoj (Clauzade & Roux 1985) kaj nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj (Clauzade k.a. 1989) (kompleta listo en `http://lichenologue.org/fr/`), kunordiganto de la revizio de la fakoj matematiko, natursciencoj kaj teknikoj de NPIV kaj PIV 2005.

Paperpoŝta adreso de la aŭtoro: 390 chemin des Vignes vieilles,
FR-84120 Mirabeau, Francio

Retpoŝta adreso: ⟨`claude.roux21@wanadoo.fr`⟩

Ricevita 2016-10-26
Akceptita por publikado 2016-11-22

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 42

Michel Duc Goninaz, lingvisto kaj akordionisto

Jacques Le Puil

Michel Duc Goninaz mortis ... jen kion mi aŭdis telefone de malnova konatino. La ŝoko estis vere tre granda, ĉar mi tute ne antaŭvidis tiel rapidan foriron.

Kun Michel ni konatiĝis antaŭ preskaŭ 40 jaroj; mi tiam estis 36-jara kaj li 42. Kiam kadre de la gazeto de la junaj SAT-anoj mi kreis la "Epikuran grupon", tuj Michel aliĝis al tiu tute neformala grupo. Post la kreado de *La KancerKliniko*, Michel kontribuos al ĝi ekde la numero 4, oktobro/novembro/decembro 1977 kun artikolo kies titolo estis "El la taglibro de neŭrozulo". Poste lia artikolo havos la nomon "El la taglibro de nekuracebla optimisto".

En 1978 Michel invitis min kanti antaŭ liaj lernantoj en la universitato de Aikso Provenca. Poste ni multfoje vizitis lin. Mi neniam forgesis la tagon, kiam ni (Armela kaj mi) devis lasi ilin (Michel kaj lian edzinon Arlette) por reveni al Tomje. Pli-malpli je la 10-a matene mi prenis mian gitaron kaj Michel sian akordionon. Kaj ek al kantado de multaj kanzonoj. Unu post la alia kaj tiam alvenis la horo por tagmanĝi. Tro malfrue por foriri al Tomje, kaj do ni remalpakis la valizojn por pludormi en Aikso!

Jes, Michel ne nur estis la brila lingvisto kiun ĉiuj konas dank' al la Nova PIV, sed ankaŭ bonega akordionisto kaj ŝatanto de kanzonoj. Cetere li, tre juna, tradukis "La Kavaliroj de l' ronda tablo"-n (kun revizio de Rajmondo Ŝvarc), kiun mi registris en mia dua KD "Sen elizi' ". Polemisto li estis kaj malfacilis kontraŭi lin! Tamen tio okazis unufoje, sufiĉe draste, okaze de artikolo kiun li sendis al LKK. Temis pri la bombado de Jugoslavio: Michel skribis tiam: "Tion ili meritis". Mi diris al li, ke mi rifuzas tion aperigi, kaj post longa diskutado, li fine rezignis.

Ĉu esperantistoj meritis havi tiun elstarulon? Mi opinias ke jes, kaj dank' al la Nova PIV kaj liaj tradukoj, lia nomo restos longtempe en la koro de ni ĉiuj.

Ricevita 2016-08-07
Akceptita por publikigo 2017-06-08

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 43–45

Detlev Blanke (1941–2016): Tuta vivo por interlingvistiko

Sabine Fiedler & Cyril Brosch
El la germana tradukis Cyril Brosch

Interlingvistoj, esperantologoj kaj Esperanto-parolantoj ne nur de Germanujo, sed de la tuta mondo funebras pri unu el siaj plej gravaj kaj konataj fakuloj: La 20-an de Aŭgusto 2016 subite kaj neatendite mortis Detlev Blanke.

Detlev Blanke naskiĝis la 30-an de Majo 1941 en Neumünster (norda Germanujo) kaj kreskis proksime al la ĉebalta urbo Wismar. Kiel abituriento en 1959 li ekstudis ĉe la universitato de Rostock kaj poste dum kvar jaroj laboris kiel mezlerneja instruisto pri la germana kaj geografio proksime al Wismar. Jam en 1957 li memstude lernis Esperanton, kies movado ja en GDR (Orienta Germanujo) rajtis reorganizi sin nur depost 1965. Sed jam en la antaŭa tempo li agitis, kiel li mem esprimis, "duonlaŭleĝe", prelegante pri Esperanto, gvidante kursojn kaj verkante artikolojn por gazetoj. En 1964 en Rostock li organizis la unuan interlingvistikan seminarion en GDR-a universitato. En tiu tempo Blanke jam aktivis internacie en TEJO.

De 1968 ĝis 1990 Detlev Blanke estis i.a. sekretario de la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, kiu nomiĝis ekde 1981 GDREA. En tiu tempo li sukcesis integri la asocion en internaciajn strukturojn, kunligi la organizan agadon kun faka kaj scienca laboroj kaj tiel havigi ioman sciencan rekonon al la planlingvo en GDR. De 1970 ĝis 1990 Blanke estis redaktisto de la gazeto *der esperantist*. Kiel vicprezidanto de GDREA li kontribuis al la unuanima kaj egalrajta kunfandiĝo de ambaŭ germanaj Esperanto-asocioj en Majo de 1991.

En 1976 Detlev Blanke doktoriĝis ĉe la Humboldt-Universitato en Berlino per verko pri kompara vortfarado Esperanto – germana, kaj en 1985 li tie habilitiĝis per verko ankoraŭ hodiaŭ grava, *Internationale Plansprachen* 'Internaciaj planlingvoj'. Lia habilitiĝo estis la unua en interlingvistiko en la tuta mondo; tiel li helpis enkonduki tiun fakon en la sciencan mondon kaj pretigis la vojon por postaj studoj. En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato.

Multmaniere kaj daŭripove Detlev Blanke kontribuis al la evoluigo de interlingvistiko. Li kreis sciencajn strukturojn, kiuj instigas kaj helpas esplori interlingvistike kaj faciligas la publikigon kaj disvastigon de la rezultoj. Precipe menciindaj estas la fondoj de la fakrondo interlingvistiko/esperantologio en la GDR-a asocio (1970) kaj de la *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (GIL; Societo pri Interlingvistiko) (1991). De 1991 ĝis 2011 Blanke estis la prezidanto de GIL; poste ĝia honora prezidanto. Krome Blanke aktivis en la Terminologia Esperanto-Centro kaj en la Komitato de UEA (1977–1997). Blanke organizis multajn sciencajn aranĝojn, ekzemple la interlingvistikajn seminariojn en Ahrenshoop (1979–1989), la internaciajn fakajn seminariojn en Bad Saarow (1978–1990), la rondtablan diskuton pri interlingvistiko kadre de la 14-a Internacia Lingvistika Kongreso en 1987 en Berlino, aŭ la sekcion *Terminology Science and Planned Languages* dum la internacia konferenco *Professional Communication and Knowledge Transfer* honore al la centjariĝo de Eugen Wüster en 1998 en Vieno.

En 1978 Blanke ekigis la Esperantologiajn Konferencojn kadre de la Universalaj Kongresoj, kaj mem gvidis la plimulton de ili. Ĉi-somere dum la 101-a UK en Nitra jam la 39-an fojon okazis la EK, kun la partopreno de Blanke mem.

Internaciskale menciindaj estas krome la kunlaboro de Detlev Blanke en la *Center for Research and Documentation on World Language Problems* (de 1974) kaj lia aktiveco en la redaktaj komitatoj de *Language Problems & Language Planning* kaj *Esperantologio / Esperanto Studies*. Multajn meritojn Blanke perlaboris krome kiel bibliografiisto. Ekzemple de 1992 ĝis 2010 kune kun Humphrey Tonkin li prilaboris la sekcion *Auxiliary languages / international languages* en la *International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures*, eldonata de *The Modern Language Association of America*. Li estis korespondanto de la Akademio de Esperanto.

Oni devas precipe substreki, ke Detlev Blanke dum sia tuta scienca kariero zorgadis pri la kunigo de teoria kaj praktika laboroj. Li konsciis, ke serioza scienca esplorado de Esperanto ne eblas sen profundaj scioj de ĝia komunumo, kaj li sukcesis kombini sian esploradon kun praktika agado movada.

Dum la lastaj jaroj Detlev Blanke precipe zorgis pri la daŭrigo de interlingvistika esplorado en la estonteco, por kio necesas antaŭ ĉio la konservado kaj disponigo de la ĝisnunaj rezultoj. Li kaj lia edzino Wera Blanke preparis la postvivan transdonon de lia ampleksega faka biblioteko pri interlingvistiko kaj esperantologio al la berlina *Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv* (SAPMO; Fondaĵo Arkivo de la partioj kaj amasorganizoj de GDR en la Federacia Arkivo). Tie jam nun troviĝas

aliaj materialoj, ekzemple pri la laborista Esperanto-movado, tiel ke iam tie haveblos unu el la plej grandaj kolektaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Detlev Blanke ricevis multajn honoraĵojn pro liaj meritoj sciencaj, ekzemple en 2011 li fariĝis honora membro de UEA. Okaze de liaj 60-a kaj 70-a naskiĝtagdatrevenoj aperis festlibroj, al kiuj kontribuis multaj kolegoj-interlingvistoj el la tuta mondo. Nur en Majo 2016 okaze de lia 75-a naskiĝtagdatreveno GIL organizis en la universitato de Lepsiko honoran kolokvion, en kiu partoprenis ankaŭ lia familio. En tiu kaj aliaj situacioj oni povis vidi, ke Detlev ne volis troajn laŭdojn, kaj ĉiam li substrekis, kia gravega parto de lia ne nur privata, sed ankaŭ scienca vivo estas lia edzino Wera. Liaj modesteco kaj malemo sin elmontradi evidentiĝis ne nur en privata rondo, sed ankaŭ en scienca medio: Detlev Blanke ne humilige instruis, sed subtenis, li ne aroge fikritikis junajn sciencistojn, sed kuraĝigis ilin al pliaj penoj (kaj tiel kunebligis kelkajn interlingvistikajn karierojn), kaj kiam li polemikis — li ja neniam kaŝis siajn konvinkojn — tiam li traktis ĉiam la aferon kaj neniam atakis la personon.

Detlev Blanke postlasas eksterordinare grandan aron da publikigaĵoj, pri kiuj superrigardon donas lia bibliografio kun pli ol 1 200 titoloj, kiu aperis en 2011 eldone de Ulrich Becker ĉe Mondial. Inter 2011 kaj 2016 aldoniĝis pli ol 50 novaj publikigaĵoj, en la germana, en Esperanto kaj ankaŭ en la angla.

Ĝis siaj lastaj tagoj Detlev Blanke senlace laboris por la interlingvistiko, ne nur per siaj propraj kontribuaĵoj, sed ankaŭ per sia same grava bibliografia agado (ekzemple *Informilo por Interlingvistoj*). Por liaj posteuloj estos apenaŭ eble investi la saman energion grandegan, ŝtopi la breĉon, kiun postlasis lia subita morto. Ne gravas, je kiu aspekto — persona, organiza, aŭ scienca — Detlev Blanke dolorige mankos al ni.

Referenco

Becker, Ulrich, red. 2011. *Interlinguistik und Esperantologie: Bibliographie der Veröffentlichungen von Detlev Blanke. Interlingvistiko kaj esperantologio: Bibliografio de la publikaĵoj de Detlev Blanke.* Nov-Jorko, NY: Mondial.

Sabine Fiedler estas prezidanto de GIL; Cyril Brosch ties vicprezidanto.

Paperpoŝta adreso de la aŭtoroj: Universität Leipzig, Geisteswissenschaftliches Zentrum, Beethovenstraße 15, DE-04107 Leipzig

Retpoŝtaj adresoj: ⟨sfiedler@rz.uni-leipzig.de⟩; ⟨kirilo81@gmail.com⟩

Ricevita 2016-09-07
Akceptita 2016-09-17

Pri la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* 1999–2018

Kun la nuna oka kajero de la revuo ni publikigis tridek kvin originalajn studojn kaj dudek unu recenzojn, notojn aŭ nekrologojn, ne kalkulante redakciajn notojn.

En la sekva tabelo esprimo de la formo $a+b$ indikas a originalajn studojn kaj b recenzojn, notojn aŭ nekrologojn.

—

With the present eighth issue of the journal, we have published 35 original studies and 21 reviews, notes, or obituaries, not calculating editorial notes.

In the table below, an expression of the form $a + b$ indicates a original studies and b reviews, notes, or obituaries.

N-ro *No.*	*Jaro* *Year*	*Paĝoj* *Pages*	*Esperante* *Esperanto*	*Angle* *English*	*France* *French*	*Germane* *German*	$\sum$
1	1999	80	6 + 0	1 + 0			7 + 0
2	2001	64	1 + 2	1 + 1	1 + 0	0 + 1	3 + 4
3	2005	68	3 + 0			1 + 0	4 + 0
4	2009	102	4 + 1	1 + 0			5 + 1
5	2011	150	5 + 1				5 + 1
6	2013	132	3 + 0	3 + 0			6 + 0
7	2015	127	2 + 2	2 + 0		1 + 0	5 + 2
8	2018	70	0 + 10	0 + 2		0 + 1	0 + 13
$\sum$		793	24 + 16	8 + 3	1 + 0	2 + 2	35 + 21

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 47–49

On Detlev Blanke: Beyond Esperanto

Michael D. Gordin

On 20 August 2016, the scholarly community lost a trusted and generous friend, Detlev Blanke. For most of those familiar with his work—and surely for most readers of this journal—Detlev was widely known as an Esperantist and an Esperantologist. The fine but significant distinction between the two represents one of the hallmarks of his multifaceted contributions to the study of *Plansprachen* ("planned languages," the alternative to "constructed languages" and "artificial languages" that he promoted so eloquently). It is also the reason that I am writing this tribute to his memory in English, neither the primary language of this journal (Esperanto) nor the language in which I communicated with Detlev (German). To me, the most salient characteristic of his tremendous contribution to this area of linguistic study and linguistic experience has been the conviction that *Plansprachen* are not just for enthusiasts, and that Esperanto has much to offer those who do not identify themselves as *samideanoj* or as members of any of the various planned-language communities. He advocated for discussion and understanding beyond these often highly-policed intellectual borders, and it was this expansive outreach that I personally most treasure in his memory.

Detlev Blanke was a name I knew very well before I had the good fortune to meet him. While working on a book about the history of language use in the natural sciences entitled *Scientific Babel* (2015), I developed a strong interest in the history of Esperanto, Ido, and other *Plansprachen*. Learning the languages and reading in the scholarship around them, I found his numerous publications on the conceptual frameworks of these experiments, and especially on the activities of chemistry Nobelist Wilhelm Ostwald (1853–1932) in the great schism between the two languages in 1907, enormously helpful. In September 2015, I moved to Berlin for a year. Within a few weeks of my arrival I received an email (in English) from Dr. Blanke about my book, which he had read carefully, focusing on my account of Ostwald. As I later came to appreciate, the communication was characteristic of many of Detlev's wonderful qualities, which those who knew him will miss greatly: it was open and generous in interpretation; it provided rare references and citations with which I had been previously unaware; it opened new perspec-

tives on *Plansprachen*; and he had worked to render it in English, suiting his mode of writing to ease his interlocutor's comprehension. We wrote back and forth, switching to his native language, and he kindly invited me out to Lichtenberg, the eastern neighborhood in Berlin where he had lived with his wife Wera for many years.

It was the first of several such encounters over the course of my year in Germany—usually in Lichtenberg, and once at an honorary colloquium in Leipzig celebrating his birthday—where I came to know Detlev and Wera much better. Those conversations have left a deep impression on me. The primary quality that struck one about Detlev Blanke when meeting him in person was his enormous joy in conversation and exchange. This undergirded his commitment to Esperanto: it was a language to facilitate communication, and his work both in the German Democratic Republic (East Germany) and internationally for the language was tireless. There was seemingly no topic in the area of constructed languages or technical nomenclature—he was a devotee, inter alia, of the Austrian interlinguist Eugen Wüster (1898–1977), who has not received nearly the international renown he deserves—upon which he could not converse fluidly and with enormous knowledge. He was not only interested in Esperanto as a language to speak to others, he was interested in why Esperanto was so successful when so many other projects had failed to reach beyond a small circle of adherents, even after (as with Volapük) striking initial successes. His publications about the features of *Plansprachen* that make them more or less effective are truly eye-opening.

At each meeting, it was inevitable that we would retire to his study at the back of his home, a two-room structure packed to the rafters with books and files about every imaginable constructed language, cross-referenced through his hand-written card catalog system. From here, the richness of the world of interlinguistics opened up. A lifetime of scholarly devotion and expertise was embedded in those rooms, and it was a scholarship that he never stinted on sharing with anyone who was curious.

These words are insufficient to fully express my admiration for Detlev Blanke as a scholar and a person. The history of Esperanto is studded with moments of magnanimity of spirit and high aspirations, but also petty infighting and short-sightedness. Detlev was an embodiment of the former, but he did not shy away from recognizing the latter as part of the humanity of the enterprise. He embraced the entirety of Esperanto's history as the legacy that the present has received from the past. Esperanto is an amazing achievement, and understanding its implications are a matter for more than Esperantists. Detlev Blanke reached from Zamenhof's creation to help establish Esperan-

tology as an area of research, and then extended beyond that community to engage with those concerned with the history and ethics of language use more broadly. That was a gift he gave to all of us, and it is a sizable one.

Reference

Gordin, Michael D. 2015. *Scientific Babel: How Science Was Done Before and After Global English.* Chicago: University of Chicago Press.

Michael D. Gordin is Rosengarten Professor of Modern and Contemporary History at Princeton University, where he specializes in the history of modern science.

Author's address: Princeton University, Department of History, 305 Dickinson Hall, Princeton, NJ 08544-1017, USA
E-mail address: ⟨mgordin@princeton.edu⟩

Received 2016 September 21
Accepted for publication 2016 September 22

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 51–54

Detlev Blanke: mia interlingvistika patro

Haitao Liu

Multaj kiuj konis Detlev Blanke certe konsentos kun mi, se mi karakterizas lian personecon per jenaj vortoj: helpemo, kunlaboremo, afableco, vigleco. Mi povas ankaŭ diri, ke li estis kompetenta sciencisto, instigema mentoro, kaj honesta idealisto. Sed tiom multaj viveroj ligis nin du, ke ni fariĝis pli ol amikoj kaj fakaj kolegoj. Por mi fakte Detlev Blanke estis mia spirita patro, kiel iam skribis Renato Corsetti.

En 2009 aperis mia ĉinlingva libro *Dependa gramatiko: el teorio al praktiko*, kiu baziĝas sur mia doktora disertacio. En ĝia postparolo mi dankas Detlev per jenaj vortoj: "Liaj multjaraj instigoj kaj subtenoj igis min kredi, ke lingvistiko estas eble la destino de mia vivo" (Liu 2009:316).

Do kiel mi renkontis mian spiritan patron? En 1981 mi komencis lerni Esperanton, kaj en la fino de 1987 mi interesiĝis pri interlingvistiko kaj esperantologio. Tamen mi ne povis trovi fakajn dokumentojn pri la temo. Tiam mi loĝis en Qinghai, en okcidenta Ĉinio, malproksime de grandaj urboj. Mi kredas, ke siatempe kie ajn en Ĉinio estis malfacile trovi tiajn materialojn, aŭ eĉ nun la problemo ekzistas. Do, ĉirkaŭ la jarkomenco de 1988 mi skribis al Detlev por peti lian helpon. Mi klare memoras, ke je 1988-04-25 mi ricevis du germanlingvajn librojn de Detlev: *Internationale Plansprachen* (Blanke 1985; Internaciaj Planlingvoj) kaj *Esperanto und Wissenschaft* (Blanke 1982; Esperanto kaj Scienco).

Fakte, la du libroj malfermis al mi la pordon al interlingvistiko kaj esperantologio. Retrorigardante la historion de interlingvistiko, *Internationale Plansprachen* jam fariĝis klasika verko en la kampo. Do, dank' al Detlev mi vere havis bonan komencon al la vojo de interlingvistiko.

En 2011, okaze de la 70-jariĝo de Detlev, Cyril Brosch kaj Sabine Fiedler (red. 2011) publikigis festlibron, kaj Ulrich Becker (red. 2011) redaktis bibliografion de la publikaĵoj de Detlev Blanke. La bibliografio enhavas 1 284 dokumentojn verkitajn de Detlev dum la periodo 1958–2011. Sendube ĉiuj dokumentoj estas gravaj por koni la akademiajn ideojn de Detlev. Sed plej multe influas min ĝis nun *Internationale Plansprachen* krom la pli posta *Interlinguistische Beiträge* (Blanke 2006; Interlingvistikaj Kontribuoj).

Estas tre bedaŭrinde, ke ni neniam renkontis unu la alian. Detlev ĉeestis la 71-an UK-on (1986) en Pekino, sed mi ne, pro la siatempa studrestado en Usono. La alian, 89-an UK-on (2004) en Pekino mi partoprenis, sed Detlev ne. Foje ni ja diskutis eblecon de nia renkontiĝo, kiel Detlev skribis je 2000-04-17:

> Vi povus veni nur al Berlino por 2–3 semajnoj (aŭ malpli, laŭ viaj ebloj) kaj trankvile labori en nia esplorejo (fakte aparta domo). De Berlino eblus atingi diversajn interesajn homojn kaj lokojn dum 3–8 horoj: ekz. Schubert, biblioteko de Aalen, Fiedler en Leipzig ktp. Kompreneble, vian kompletan restadon ni kovrus.

Ni tamen multege korespondis unue per paperaj leteroj kaj poste per retmesaĝoj. En la daŭro de 28 jaroj, t.e. ekde la komenco de 1988 ĝis la subita forpaso de Detlev en aŭgusto 2016, ni interŝanĝis pli ol mil paperajn leterojn kaj retmesaĝojn.

Dum tiuj jardekoj Detlev ankaŭ sendis al mi sume pli ol cent gravajn librojn kaj aliajn dokumentojn pri interlingvistiko. En diversaj etapoj, por certigi la alvenon de la sendaĵoj, Detlev ĉiam petis min sendi al li mian adreson en ĉinaj ideogramoj.

Nia komuna interesiĝo pri interlingvistikaj materialoj esence radikiĝis en niaj amo al interlingvistiko kaj volo disvastigi tian amon al la mondo per scienca metodo.

Sed pri kia interlingvistiko temas? Tiurilate mi ricevis de Detlev profundan fakan kaj spiritan edifadon. Tiu edifado okazis tra amaso da leteroj kaj retmesaĝoj interŝanĝitaj inter Detlev kaj mi — kaj libroj kaj dokumentoj senditaj de Detlev al mi. La plej grava influo kiun Detlev donis al mi verŝajne koncernas bazajn vidpunktojn pri lingvistikaj esploroj.

Mallonge dirite temas pri la konstato, ke lingvo ne estas pura sistemo de simboloj, kaj ke ajna lingvistika esploro devas atenti la homajn faktorojn. Tio estas valida ne nur por interlingvistiko, sed ankaŭ por kvanta lingvistiko.

Mi iam skribis en mia komparo inter la verkoj de Detlev Blanke (1985) kaj Alicja Sakaguchi (1998):

> El scienca vidpunkto, la du komparataj monografioj konsidereblas kiel gravaj bazoŝtonoj, sur kiuj konstruiĝos la interlingvistika domego. Ni ne forgesu ke sociologio ĉefe kungluas la konstruaĵon de Blanke, kaj lingvistiko tiun de Sakaguchi. Ili ambaŭ konstruas samtipan domegon, sed per iom malsamaj gluaĵoj. Tiuj du gluaĵoj reprezentas la ĉefajn tendencojn de interlingvistika konstruado kaj formiĝo. (Liu 1999)

Tie, kie mi diras ke lingvistiko kungluas la domegon de Sakaguchi, fakte mi volis diri ke la semiotiko ludas gravan rolon en ŝia libro. Tamen, en la verkoj

de Detlev ni povas facile rimarki lian emfazon de la influoj de sociaj faktoroj al lingvaj evoluadoj kaj aliaĵoj.

Laŭ mia nuna kompreno estas tre inde kaj ankaŭ ende konsideri la sociajn aŭ homajn faktorojn en lingvaj esploroj, ĉar homoj, kiel la kreintoj kaj uzantoj de lingvo, ne vivas en vakuo. La socia ĉirkaŭaĵo kaj kogna strukturo de la homo sendube influas la multajn flankojn de la homa lingvo (Liu 2014). Por konsciigi min ĝuste pri tio Detlev ludis tre ŝlosilan rolon, kaj pri tio mi estas profunde danka al li.

En la fino de 1999 mi konsciiĝis, ke Detlev festos sian 60-jariĝon en 2001. Pro la grandaj meritoj de Detlev en la interlingvistika kaj planlingva terenoj estus inde havi festlibron al lia 60-jariĝo, mi pensis. Tamen, redakti tian libron ne estas facila tasko. Do, mi skribis al Sabine Fiedler pri ebla kunredaktado komence de 2000. Tuj mi ricevis respondon. Ŝi skribis i.a.:

> Estas proverbo en la germana lingvo (. . .): Du homoj unu penso. Mi komencas mian leteron per menciado de tiu proverbo, ĉar dum la pasintaj du semajnoj mi okupiĝis pri tiu ideo. Sur mia skribotablo jam kuŝas listo kun nomoj de eblaj kontribuontoj al la festlibro.

Ni sendis al eblaj kontribuontoj alvokon je 2000-01-27. Tuj reagis Humphrey Tonkin kaj Probal Dasgupta, kaj sekvis aliaj. Ĉio iris glate, kvankam kompreneble necesis grandega kvanto da komunikado inter ni, la redaktoroj, kaj la aŭtoroj.

Fine la festlibro ampleka je 736 paĝoj kaj kun 43 kontribuaĵoj ĝustatempe eliris el la presejo antaŭ la 60-jariĝo de Detlev (Fiedler & Liu, red. 2001). Li skribis al mi je 2001-06-12:

> Mi ĵus revenis el la sudo de Germanio kaj finfine povas tre kore danki vin pro la grandioza festlibro, kiun vi kaj Sabine pretigis por mi. Ĝi estis la plej bela naskiĝtaga donaco, kiun mi povis imagi. En la kadro de la Germana Esperanto-Kongreso en Ludwigshafen ĉe la rivero Rhein Sabine faris paroladon kaj publike transdonis al mi ekzempleron de la libro. Ankaŭ la eldonisto faris paroladeton. Mi dankis al ĉiuj, inkluzive de vi, kompreneble. Nun mi tute ne povas laŭmerite danki al vi, ĉar tio postulus kelkpaĝan leteron. Mi simple esprimas mian ĝojon, ke mi trovis tiel inteligentan, kreivan, diligentan kaj simpatian amikon en Ĉinio. Estas al mi plezuro ankaŭ estonte iom helpi, ke via interlingvistika biblioteko kresku.

Mi ĝojas ĝis nun, ke mi tiel sukcese povis kuniniciati kaj efektivigi omaĝon al Detlev. En la interreto oni ankoraŭ nun povas facile legi la festlibron ĉe `www.lingviko.net/db/index.htm` .

Laŭ mi Detlev Blanke estas la patro de la moderna interlingvistiko.

Referencoj

Becker, Ulrich, red. 2011. *Interlinguistik und Esperantologie. Bibliographie der Veröffentlichungen von Detlev Blanke. Interlingvistiko kaj esperantologio. Bibliografio de la publikaĵoj de Detlev Blanke*, 234 pp. Nov-Jorko, NY: Mondial. ISBN 978-1-59569-202-3.

Blanke, Detlev. 1985. *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlino: Akademie-Verlag.

Blanke, Detlev. 2006. *Interlinguistische Beiträge: Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*, 405 pp. Redaktita de Sabine Fiedler. Frankfurt am Main: Peter Lang. ISBN 3-361-55024-3.

Brosch, Cyril; Fiedler, Sabine, red. 2011. *Florilegium Interlinguisticum: Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag*, 424 pp. Frankfurt am Main k.a.: Peter Lang. ISBN 978-3-63128-3.

Fiedler, Sabine; Liu Haitao, red. 2001. *Studoj pri interlingvistiko – Studien zur Interlinguistik. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke – Festschift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*. 736 pp. Dobřichovice: KAVA-PECH. ISBN 80-85853-53-1.

Liu, Haitao. 1999. Kiel evoluas interlingvistiko? *Language Problems and Language Planning* **23**(1), 65–77.

Liu, Haitao. 2009. *Dependency Grammar: from Theory to Practice*. (En la ĉina.) Pekino: Science Press.

Liu, Haitao. 2014. Language is more a human-driven system than a semiotic system. *Physics of Life Reviews* **11**, 309–310.

Sakaguchi, Alicja. 1998. *Interlinguistik: Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt am Main: Peter Lang.

Prof. d-ro Haitao Liu diplomiĝis pri elektrotekniko de la Universitato Xi'an en 1983. De 1983 ĝis 2002 li laboris kiel inĝeniero, supera inĝeniero kaj eminenta inĝeniero en la Aluminia Kompanio de Ĉinio (CHALCO), Xining kaj Pekino. De 2002 ĝis 2010 profesoro en la Komunika Universitato de Ĉinio, Pekino. En 2006 doktoriĝis pri lingvistiko ĉe la sama universitato. Ekde 2010 ĝis nun eminenta profesoro de la Universitato Zhejiang, Hangzhou, Ĉinio. Aŭtoro de ĉ. 150 publikaĵoj pri lingvoj kaj lingvistiko. Ĉefaj esplorkampoj: kvanta lingvistiko, dependa gramatiko, interlingvistiko, lingvo-planado. En 2016 li estis elektita al la Akademio de Esperanto.

Paperpoŝta adreso de la aŭtoro: Zhejiang University, Department of Linguistics, No. 866 Yuhangtang Road, CN-310058 Hangzhou, Ĉinio
Retpoŝta adreso: ⟨htliu@163.com⟩
URL: www.lingviko.net/; mypage.zju.edu.cn/lht

Ricevita 2016-09-24; reviziita versio ricevita 2016-10-19
(pli ampleksa versio aperis ĉe la retejo de
El Popola Ĉinio, redaktita de Usui Hiroyuki)
Akceptita por publikigo 2016-10-12; 2016-10-19

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 55–56

Paul Gubbins (1949–2016)

Probal Dasgupta

Mi havas la malgajan devon sendi al la familianoj kaj la intima rondo de Paul Gubbins la kondolencojn de la Akademio de Esperanto, kiu estis fiera havi lin en siaj vicoj jam ekde 2007. En la Akademio, Paul estis ĝis sia forpaso la direktoro de la Sekcio pri Literaturo kaj laboris ankaŭ en la Konsultejo kaj la sekcio pri Kontrolado de Lerniloj.

Lerninte Esperanton kiel laboranta plenkreskulo, Paul akute perceptis la bezonojn de tiaj lernantoj. Li krome estis escepte dotita sur la teatra tereno: li verkis plurajn pintajn dramojn kaj estis la plej elĉerpa elspuranto de la originalaj teatraĵoj en nia lingvo. Tial li insiste lokis en la plenkreskula vivo la viglajn konversaciojn en siaj sukcesaj kaj abunde laŭditaj lernolibroj de Esperanto.

Fizike maleblas listigi por vi la serion da teatraĵoj, lernolibroj, aŭdvidaj lerniloj, kiujn Paul verkis, kunkreis, reviziis, plej laste la lernilaron de *Duolingo*. Daŭrus tro longe eĉ nur listigi la premiojn ricevitajn de li. Li portis ĉi tiun kronon ege modeste. Tiu modesto ebligis al Paul modelan stilon de instruado. Mi mem persone spertis lian stilon en Torino, kiel lernanto en lia kurseto pri la Esperanta teatro. Paul tute flue gvidis nian kolektivan laŭtlegadon de la dramoj, forgesigante la nivelan malegalecon inter la partoprenantoj.

Li krome elpaŝis el niaj kutimaj podioj kaj premis surprizajn klavojn. Aparte menciindas lia antologio de originalaj Esperantaj beletraĵoj kun angligoj, *Stars in a Night Sky*. En sia rolo de ĉefredaktoro de Monato, Paul ĉi-jare helpis efikege fajli kaj reliefigi raporton pri temo draste malatentata en la ĉefaj amaskomunikiloj de la mondo — la atencoj kontraŭ dalitoj (aŭ ‘parioj’) en Barato. Nia samakademiano Giridhar Rao kaj multaj ekster-Esperantaj agantoj por la rajtoj de dalitoj en Barato aprezis ĉi tiun kontribuon de Paul. Ankaŭ ili petis min komuniki al vi tutkorajn kondolencojn pro la subita forpaso de eksterulo, en kiu ili trovis samideanon kaj kun kiu ili esperis daŭrigi la konversacion. Ni devos daŭrigi plurajn entuziasmajn konversaciojn lanĉitajn de Paul Gubbins por akiri la rajton vere omaĝi al li. Mi ne sukcesas kredi, ke ni meritis lin. Mi ne scias, kiavorte konsoli vin, aŭ min mem.

⋆

I have the sad responsibility of conveying to the family and others closest to Paul Gubbins the condolences of the Esperanto Academy. It was a privilege for us that he was a member since 2007. In the Academy, Paul was, until his passing away, director of the Literature Section; he was also an active member of the Queries Section and the Textbook Monitoring Section.

The fact that he had learnt Esperanto as a working adult himself made Paul responsive to the needs of such learners. Besides, he had exceptional gifts in the theatrical domain: he wrote several major plays and was the most indefatigable tracker-down of plays written in Esperanto. These factors led him to make sure that the vivid conversations in his much celebrated Esperanto textbooks were always anchored in real life.

It is beyond our powers, physically, to give you a list of all the plays, textbooks, audio-visual materials that Paul wrote, co-wrote or tweaked, most recently the Esperanto course in the *Duolingo* system. It would take too long even to list all the prizes he was awarded. Paul wore these accomplishments very lightly indeed. This modesty underpinned the phenomenal way he taught. I got a personal taste of it in Turin, where I took his Esperanto theatre course. Paul effortlessly steered our group through our play-reading exercises, pushing out of view our very uneven gifts.

Paul sometimes left the beaten path and opened surprising new doors. One example one must mention is his anthology of original Esperanto writing with English translations, *Stars in a Night Sky*. Besides, as chief editor of the news magazine *Monato*, Paul helped some of us this year to optimize a report on a piece of news that the mainstream has been blacking out all over the world—attacks against Dalits (once called 'pariahs') in India; he then proceeded to give it a front page headline in the June issue. Our colleague in the academy Giridhar Rao, and many non-Esperanto activists working for the rights of Dalits, appreciated Paul's major contribution to the cause. They, too, have asked me to convey to you their condolences on the sudden passing of an outsider who cared for them and with whom they had hoped to continue the conversation. We will have to continue several enthusiastic conversations that Paul kickstarted if we are to earn the right to pay him serious homage. I cannot bring myself to believe that we really deserved him. I don't know what to say to console any of you, or myself.

Probal Dasgupta estas prezidanto de Akademio de Esperanto.

Ricevita 2016-08-10
Akceptita por publikigo 2016-08-15

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 57–68

Memoro pri Reinhard Haupenthal (1945–2016)

Carlo Minnaja

1. Ĝeneralaj trajtoj

La ekscio pri la forpaso de Reinhard Haupenthal (RH) atingis min ŝoke: ni estis intermesaĝintaj eĉ nur kelkajn tagojn antaŭe, mi ankoraŭ sendis laŭ lia peto iujn presaĵojn, kiuj tre verŝajne ne atingis lin vivanta.[1] Tial mi ame gardas lian lastan manskribaĵon sur bileto, dediĉe pri liaj tradukoj *Plukoj dum sencelaj promenoj* (2016):

Por Carlo
kun danko por tiom da amikaĵoj kaj komplezoj
La plukinto
R. H.
13/5/16

Kaj ankaŭ la frontispica dorso versas pri lia sentemo: *Irmi,*[2] *proz' kaj poezio — Jen mia Sankta Trio.* Li laboris vere ĝis la lasta tago, en la oktobra numero 2016 de *Beletra Almanako* aperas eseo de li pri Arthur Schnitzler.

Rakonti malmultpaĝe pri RH ne estas facile. Jam je lia kvindekjariĝo lia bibliografio, aperinta sub la nomo de lia sola filino, ampleksis 50 paĝojn (Esther Haupenthal 1995). Kiam oni malfermas la libron kun lia bibliografio de dudek jaroj poste, oni restas imponita: ĝi estis finkompostita je la 2014-12-31, do preskaŭ du jarojn antaŭ lia forpaso, kaj estis jam registritaj 1 015 eroj (Reinhard Haupenthal 2015). Sekvis ankoraŭ pluraj aliaj plenumitaj dum la lastaj dudek du monatoj de lia vivo.

Ĉu esperantisto? Ne nur, ja: li studis ankaŭ volapukon, idon, occidenton, interlingua-n, kvankam li neniam ilin uzis.

La detala biografio rakontas pri lia alproksimiĝo al esperanto en 1961; ankoraŭ ne abituriento, sed jam dinamisma parolanto de la lingvo post unujara memlernado. Aldone, li estis jam komencinta kolekti ĉiuspecan materialon pri interlingvistiko kaj planlingvoj, kiu poste, kun pluraj akiroj en plej diversaj okazoj, fariĝis ekstreme valora. En du-tri situacioj, ĉe morto de esperantisto, se ties familianoj ne donis plenan garantion pri la konservado de

[1] Reinhard Haupenthal estis naskita 1945-02-17 kaj mortis 2016-09-29.

[2] Irmi (Irmtraud) Haupenthal, naskita Lukesch, estis lia edzino dum 47 jaroj.

la esperanta biblioteko de la forpasinto, RH surprenis la zorgon pri la savo de tiu materialo. Lia vivfilozofio estis esence historia: la paseon oni devas gardi, koni, ĉar kiam ni mortas tuta kapitalo de memoroj mortas kun ni. En tiu alrigardo ankaŭ enkadriĝas lia skrupula laboro por represi (kaj komentarii) elĉerpitajn verkojn: tiel revidis la lumon *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe (tr. L. L. Zamenhof 1908), *Hermano kaj Doroteo* de Goethe (tr. B. Küster 1922), *Elektitaj fabeloj* de fratoj Grimm (tr. Kabe 1906), *La rabeno de Baĥeraĥ* de Heine (tr. L. L. Zamenhof 1924), *Paŭlo Debenham* de Luyken (1912), *Verdkata testamento* de R. Schwartz (1926) kaj multaj aliaj. Aparte grave, li instigis la renoman eldonejon Olms al represo de *La Esperantisto* (1988), la unua esperanto-gazeto, vivinta inter septembro 1889 kaj aprilo 1895. Tie oni trovas preskaŭ la solan fontmaterialon por la frua historio de nia lingvo: la unuaj poetoj, la verva redaktado de Zamenhof, la lingvaj respondoj, lia malfacilo trovi profesian stabilecon, la neceso ĉion forlasi kaj tuj poste la savo far Trompeter, ĝis la finofara bato de la cara malpermeso pri enirigo de la gazeto en Rusujon. La postparolo de Haupenthal estas zorge verkita kaj optimisma (tiu optimismo estis poste parte trompita).

Malfacilas decidi de kie komenci por esplori la multajn iniciatojn de RH. Studento en la Universitato de Sarlando (1964–1969) pri ĝermanistiko, katolika teologio, filozofio, pedagogio kaj kelktempe historio, li estis dum longa tempo (1968–1994) instrukomisiito por esperantologio kaj interlingvistiko ĉe la universitato de Sarlando, Saarbrücken; lia kariero en la lernejo (gimnazio) atingis la rangon de supera studkonsilisto, ĝis deĵora akcidento je 1993-01-13 metis finon al lia aktiva lerneja deĵoro, kiun sekvis pensiiĝo 1996-03-01. Eldonanto, verkanto de antaŭparoloj, postparoloj, komentarioj, tradukanto de plurdekoj da verkoj; preleganto, verviganto, akademiano; polemikojn li ne rifuzis, eĉ mem iniciatis. Ankaŭ al la amikoj li estis tre ofte akre kritika, tiel ke malmultaj havis poste la paciencon superflugi la momentajn vortojn kaj malgraŭ ĉio daŭre rilati kun li afable. Li eksiĝis el la Sarlanda Esperanto-Ligo (kies afergvidanto-sekretario li estis 1973–1988), el la Germana Esperanto-Asocio, el UEA (kies ĉefdelegito por Germanujo li estis 1964–1971). Li preferis pli malvastajn mediojn: en 1991 li estis membro-fondinto de la Societo Kálmán Kalocsay (membro ĝis 2008), en 2001 membro-fondinto de Prelato-Schleyer-Komitato (membro ĝis 2008), celanta ties beatigon.

2. Redaktoro kaj tradukisto

RH estis redaktoro dum multaj jaroj de revuoj, eĉ samtempe de tri. Ĉar profesie instruisto (ĉefe pri la germana lingvo kaj pri religio), ne strange, ke

li komence redaktis la *Internacian Pedagogian Revuon*, organon de la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, eldonatan en Roterdamo; tiu sperto estis mallonga, nur tri numeroj de 1973 al 1974.

Pli longa estis lia redaktado ĉe *Dialogo* (1973–1988; la unuaj dek numeroj sub titolo *Cirkulero*), organo de Sarlanda Esperanto-Ligo, kiu kronikis la agadojn en tiu federacia lando.

Sendube plej grava estis la redaktado de *Iltis-Forumo*, "internacia kultura-literatura revuo en Esperanto"; en la germana *Iltis* signifas 'putoron', kaj sur la kovrilpaĝo aperis desegno de tiu simpatia besteto. La proprietulo de la eldonejo estis Ortwin Deubert, presejestro, sed tiam Haupenthal estis ŝtata oficisto kaj ne rajtis mem estri privatan entreprenon. La revuo daŭris per 21 numeroj dum 7 jarkolektoj (1989–1995) tra entute 696 paĝoj. Sed ĝi estis, kvankam malmultpaĝa, riĉenhava, kun preskaŭ fiksa skemo: ĉefartikolo pri iu elstara persono kun ties frontpaĝa portreto, beletraĵo, recenzo, lingva/lingvistika artikolo, diversaĵoj. Ekzemple, en n-ro 2 de jarkolekto 1 (1989) la ĉefartikola protagonisto estas Henry Jacob (ne konfuzinda kun Hans Jakob), unu el la plej brilaj figuroj de la Ido-movado: antaŭa esperantisto, poste forgesita de la esperanto-socio, kiel okazis al ĉiuj kiuj faris alian elekton pri planlingvo. Jacob estis redaktoro de la Ido-revuo *Progreso* (1935–1939; 1946–1954) kaj prezidanto de la *Uniono por la Linguo Internaciona* (1973–1987), laboris ĉe UNESCO por subteni la edukan evoluon de la tria mondo kaj multe vojaĝis en Afriko, Azio, Antiloj; malgraŭ la granda labora engaĝo li publikigis plurajn verkojn en esperanto, angla, ido, nun gardatajn ĉe la biblioteko de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Lingvo Internacia (CDELI) en Ĉaŭdefono.

En n-ro 3 de jarkolekto 4 (1992) preskaŭ la tuto estas dediĉita al la poezio de iberoj, de Camacho al Montagut, de Liven Dek al Gonçalo Neves, kaj tio, dirindas, jam pli frue kaj multe pli ekvilibre ol faris la panegiroj per kiuj poste ties amikoj erupciis en la lastaj dudek jaroj. "Por vino bona, ŝildo ne bezona" kaj por poeto bona laŭdo ne bezona.

Se ankoraŭ promeni tra la jarkolektoj, n-ro 2 de jarkolekto 4 (1992) regalas nin per latva repertuaro, kun multaj preskaŭ nekonataj sciigoj pri Maksis Ĉulitis, kontribuinto al *Naŭ poetoj*, sed kies spuroj tuj malaperis ĝis la persisto de Haupenthal sukcesis retrovi lian vojon post lia formigro al Kanado en 1952. Sed estus tro multo dirinda, ĉiu numero el la dudek unu aperintaj estis juvelo. La numero 3 de la jarkolketo 5 (1993) estas dediĉita grandprocente al leksikologio, kun recenzoj tre akraokulaj pri la vortaroj germana-esperanta de Krause (1993) kaj franca-esperanta de Le Puil kaj Danvy (1992). La stilo de Haupenthal pri recenzoj ne altiris al li simpation; eĉ kiam liaj rimarkoj

estis pravaj, la maniero ilin elmeti estis senbezone draŝa: lia ĉefa registrado estis pri eraroj, pri tio kio mankas, pri misoj eĉ malgrandaj; la ofte grandioza engaĝo de la respektivaj aŭtoroj estis minimumigita, laŭdoj apenaŭis. Titolo kia "Mult-loke misgvida kaj erariga" (p. 78) pri la 939-paĝa franca vortarego estas senkuraĝiga; la noto pri la preskaŭ 600-paĝa germana (p. 83, noto 4) tiel tekstas: "La dua 'reviziita' eldono reproduktas senŝanĝe ĉiujn fuŝojn, misojn kaj mankojn de ĉi GDR-vortaro." La supraj linioj ne signifas, ke la recenzoj de Haupenthal estis iel malicaj, kiel bedaŭrinde kelkaj ja estas en mondo malgranda kiel la esperantlingva, sed ke la serĉado de perfekteco ne ĉiam kongruas kun la ebleco de la aŭtoro, kutime laboranta en la ŝparitaj horoj kaj nepagate, nek de la leganto, por kiu ekstrema precizeco eĉ ne estas bezonata. Tamen lia stilo ne nur recenza, sed ankaŭ personrilata ne estis akceptata ĉie bonvene, kaj kaŭzis pli ol unu skermadon, ĉefe kun Giorgio Silfer kaj Georgo Camacho.[3] Vortoj maloportunaj ambaŭflanke, tiom pli, ke en restrikta mondeto ankaŭ simpla skermado alprenas la dimensiojn de interŝtata milito.

Lia interesiĝo kaj kompetento pri volapuko klasas lin inter la plejaj kompetentuloj pri la temo: en 1985 li ekredaktas la fakan revuon *Volapükabled*, kiu aperas ĝis 1987 per entute 88 paĝoj; daŭrigo de tio estos la ununura numero de *Volapukaj studoj*, 28 paĝoj en 1990.

3. Aŭtonoma eldonado

Post la pensiiĝo en marto 1996 RH povis sin dediĉi tute al faka verkado; en 1997 eldonejo nove fondiĝis sub la nomo Edition Iltis fare de lia edzino Irmi, ankaŭ emeritiĝinta. La historio de tiu eldonejo, daŭranta ĝis nun, troviĝas en tre akurata dulingva A4-formata broŝuro: en ĝi, pri la nomo *Iltis* Haupenthal mem rakontas tiel:

> Iam, en 1968, 23-jara, mi ekhavis la ideon eldoni kelkajn verketojn sub pseŭdonima nomo eldonista. Tiel estiĝis la nomo Artur E. Iltis, kiun poste mi registrigis en mia pasporto kiel nomon artistan. Mia intenco estis eldoni kelkajn elĉerpitajn verketojn kiujn mi juĝis gravaj kaj rehavindaj kaj kiujn vaka poŝo studenta povus financi. La unua titolo tamen montriĝis ekstervica: en la tiama Germana Esperanto-Revuo aperis artikol-serio de iu Kanguruo, aplaŭdata de iuj, malaprobata de aliaj. Inter ĉi-lastaj troviĝis la tiama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, la kroat-devena juristo Ivo Lapenna (1909–1987),

[3] Giorgio Silfer estas la plumnomo, notarie registrita kiel dua nomo, de Valerio Ari, kaj kiel tia li estas konata en ĉiuj literaturaj medioj; Haupenthal insiste plurloke deklaris la veran nomon, kvazaŭ tio estus originala malkaŝo de sekreto kaj kvazaŭ uzado de plumnomo estus io mokinda.

> kiu forte polemikis kontraŭ la satiroj kiujn li opiniis defetismaj kaj sekve malutilaj por Esperanto. (Reinhard Haupenthal 2010:6–7)

La verketo estis ja eldonita, kvankam tiam ankoraŭ sub la pseŭdonimo "Kanguruo" sen la vera nomo de la aŭtoro, Michael Zeilinger (1968); sekvis represoj de Saussure, Wüster, Zamenhof, Kalocsay.

En 1973 komenciĝis kunmikso de eldona aktivado kaj vivo esperantista pli ĝenerala, en teritorio kie la esperanto-agado estis letargianta. Elstaris tiam la organizado de Kulturaj Semajnfinoj (31 entute), en kiuj prelegis inter la plej famaj esperantologoj, de André Albault al William Auld, de Michel Duc Goninaz al Juan Régulo Pérez kaj pluraj aliaj elstaruloj. La dua fazo de Iltis tiriĝis tra dek tri jaroj: 1975–1988, produktante 129 titolojn. Inter ili estis lanĉita en 1983, antaŭvide al la centjariĝo de la lingvo, Jubilea Eldon-Serio kun kvin sekcioj kaj entute 62 titoloj: Beletro originala (13 titoloj numeritaj de 1 ĝis 14; la 13-a ne aperis), Beletro tradukita (14 titoloj), Esperantologio (24 titoloj), Interlingvistiko (7 titoloj), Scienco (4 titoloj). Kvankam ne ĉiuj aperis oficiale sub la nomo de Artur E. Iltis, tamen la laboro de la eldono estis de Haupenthal. Lia eksiĝo en 1988 el la Sarlanda Esperanto-Ligo kiu ĝis tiam aperis kiel eldonanto, devigis lin trovi alian solvon por plue flegi sian laboron.

Tial li rezignis ĉe eldonado pri la tuta nomo Artur E. Iltis kaj transiris al simpla "Iltis", por ne surmetiĝi al la deponita artista nomo; tiun nomon surprenis Ortwin Deubert, presejestro en Saarbrücken deziranta eldoni librojn, kaj la serioj antaŭe lanĉitaj povis daŭri sub la nova nomo: Beletro originala (9 titoloj), Beletro tradukita (8 titoloj), Esperantologio (14 titoloj), Interlingvistiko (2 titoloj), Scienco (2 titoloj). Cetere oni jam parolis ene de la esperanto-mondo, pri la "iltisa skolo", nomo kiun Haupenthal mem lanĉis tra la laŭdacio farita al Gaston Waringhien en Aŭgsburgo en 1985. Krom tiu abunda rikolto aperis ankaŭ, dum la jaroj, iuj franclingvaj gvidlibroj pri vinoj, verkitaj kun Irmi.

Entute, persone de li verkitaj aŭ tradukitaj, estas 41 libroj, je grando inter 12 kaj 110 paĝoj. Apartan atenton Haupenthal havis al la personoj kaj al iliaj bibliografioj, tiel ke li startigis la kutimon, oftan en Germanio sed ankoraŭ ne tiom en Esperantio, pri festlibroj dediĉitaj al grandaj personecoj. Li alvokis al kunlaboro per artikoloj, redaktis, komentariis, antaŭparolis, postparolis, eldonis. Malfacilas diri, en kiu el ĉi tiuj entreprenoj li pleje elstaris. La pli ol 500-paĝa festlibro por la 80-jariĝo de Gaston Waringhien sub diversaj lumoj evidentigas la personecon de la jubileanto (Reinhard Haupenthal, red. 1985), kaj la unua artikolo "Waringhien — multfaceta" estas de Haupenthal, same kiel la kontribuo pri Schleyer kaj la bibliografia parto (kun Henri Vatré).

Alia okdekjariĝa jubileanto estis en 2011 Claude Gacond, kaj geedzoj Haupenthal kunmetis por li festlibron (2011), en kiu Reinhard respondecis kiel kutime pri la ampleksa bibliografio. Aliaj festlibroj rilatis al André Albault, Adolf Burkhardt, Fernando de Diego. Antaŭ ol la publikigo far Iltis estis preskaŭ nekonata Piĉ, kiu per siaj eseoj lasis profundan ĉizon en la esperanta literaturkritiko (Piĉ 1995). Al Piĉ eldonejo Iltis dediĉas dek kvin titolojn: inter ili estas la klasikaj romanoj, la poemaroj, novelaro, la diskut-forumoj. Ĉar ĉi lastaj estis esencaj en la vivo kaj de Piĉ kaj de Haupenthal. Se per unu hako oni povus dividi la du partiojn, Piĉ, Haupenthal, Eli Urbanová kaj la "Praga Skolo" verkis kaj ellaboris la lingvan instrumenton por si, dum Silfer celis havi antaŭ si la popolon. La aliro al la lingvo estis do necese malsimila: se Piĉ ellaboris, fakte ĝisfunde eltordis, la latentojn de la lingvo jam aluditajn de Zamenhof, al li estas kontestite, ke tiujn ellaborojn la publiko ne komprenas, ke ili estas nur akademiaj ludoj por kontentigi lian beletristan emon.

Grandan kapablon Haupenthal pruvis en la tradukado. Laŭirante per la fingro la libroliston de Iltis oni trovas tradukojn el Breyer, Büchner, Bürger, Eichendorff, Fabry, Fontane ... kaj oni haltas kun atento ĉe la Germanaj klasikaj noveloj el Schiller, Goethe, Annette von Droste-Hülshoff. Imponas plue *La suferoj de la juna Werther* de Goethe, kun antaŭparolo de Ragnarsson. Pluirante laŭ la alfabeta ordo ni trovas Hauff, Hoffmann, Huch, Keller, la fablojn de Lessing, Schnitzler. Ĉe eldonejo Fonto aperis lia traduko de *La Metamorfozo* de Kafka. Malmultaj el liaj tradukoj superas 100 paĝojn: li troviĝas plej intime en la noveloj aŭ mallongaj romanoj. Lia lingvaĵo estas, se ni povas diri, "klasike avangarda": multfoje li dividas per streketo la diversajn radikojn en kunmetita vorto, ja mult-foje, kvazaŭ ordinara leganto bezonus ĉi tiun helpon por pli rapida kompreno; aliflanke li uzas kelkajn, fakte pokajn, neologismojn, kiuj avertas, ke la traduko ne estas de antaŭhieraŭ, sed tute aktuala, eĉ antaŭenrigarda.

4. La Iltisa Skolo kaj la Literatura Manifesto '87

> Kiam, en 1968, sub la artista nomo Artur E. Iltis, mi komencis la publikigon de kelkaj broŝuretoj, ne prevideblis ke el tio fariĝos pli ol epizodo kaj ke renomaj literatoj poste komencos paroli pri la Iltisa Skolo. (Reinhard Haupenthal 2010:54)

Tiel RH komencas la rakonton pri tre interesa momento de la literaturhistorio. Jam en du linioj la uzo de *pre* kiel prefikso iom avangarda en *previdebla*, anstataŭ la pli uzata *antaŭvidebla*, kaj la enkonduko de *literato*, kiu sinkopas

la zamenhofan, tamen antikviĝintan, *literatoro*, sinonimon de *literaturisto*, indikas, ke la lingvon li volas muldi por si mem; aliaj liaj ŝiboletoj estas *decenio* por *jardeko* aŭ *jardeka celebrado*, *jaralo* por *jarkolekto* de revuoj aŭ simile. La aŭtoroj, kiujn li kunpartoprenigis en la "Iltisa Skolo" per personaj renkontoj, invitoj al prelegado, intensa leterado ĉefe limiĝas al Henri Vatré (1908–1998), Fernando de Diego (1919–2005) kaj Karolo Piĉ (1920–1995). Kiu spirita parenceco ilin kunligis? Fakte, preskaŭ nur la bezono krei multe pli vastan vortostokon, kiu povu kontentigi ankaŭ la plej rafinitajn literaturistojn, tradukistojn, eseistojn. Siatempe la *Parnasa Gvidlibro* (1931) de Kalocsay kaj Waringhien renkontis multajn opoziciantojn pro la abundo da novaj vortoj registritaj en la poezia fakvortaro. Polemiko tute malsprita, kvazaŭ oni riproĉus al medicinistoj aŭ matematikistoj, aŭ inĝenieroj, aŭ biologoj, ke ili havas sian vortostokon rilatantan al ilia profesio. Ordinara persono ne bezonas distingi apartan specion de samfamiliaj plantoj, aŭ koni la teknikan vorton de tiu aŭ alia tipo de ĉevrono. La polemiko estis jam antikva jardekojn: unuflanke staris tiuj kiuj volis esperanton kapabla je ĉia arta esprimo, do kun adekvata vortprovizo por ĉiu literatura bezono, aliflanke staris la instruistoj de la baza lingvo, kiuj maltrankviliĝis vidante, ke la elementa vortostoko kiun ili instruas aspektas nesufiĉa kaj superata de abundo da neologismoj. Vatré elpaŝis per sia *Neologisma glosaro*, kiu ĝisvivis kvar eldonojn: 1983, 1987, 1989, 1997, fakte ĉ. 2 000 novaj vortoj; de Diego atingis plej altajn tradukajn pintojn en *Don Quijote*, Piĉ estis revelacio per sia unua romano *La litomiŝla tombejo*, kaj pro la ege eksperimenta lingvaĵo (kiu tamen havos neniun sekvanton), kaj pro la intensa priskribo de sia nefeliĉa vivo. Kiel RH diras, "Esperanto ne estas tio aŭ alio, sed nepre tio kaj alio."

La *Literatura Manifesto '87* de la Iltisa Skolo aperis okaze de la 100-jara ekzisto de Esperanto; ĝi estis publikigita en pluraj revuoj kaj akiris unuopajn subskribojn de esperantistoj el 27 landoj.[4] Ĝi longas du plenajn paĝojn kaj ĝia esenco estas parte historia ("la lingvo ne dissplitiĝis, ĝi sukcese kapeis tra detruaj ŝtormoj kaj ĉio-renversaj uraganoj"), parte senutile agaca kontraŭ kelkaj aloj de la esperanto-movado ("ŝtormoj kaj uraganoj koviĝis ankaŭ en la esperantistaj medioj, la verda popolo kiu volas uzi la lingvon nur kiel plaĉan hobion, eternaj komencantoj"), parte fiera pri si ("progresemaj aŭtoroj, daŭrigas la tradicion riĉigi la lingvon, responsaj esperantistoj kaj aŭtoroj gvidataj ankaŭ de sia artisma sento"), parte serĉanta malamikojn ("eĉ eminentaj esperantistoj plu tamtamas; la Skolo ne povas preni serioze la protestojn; kunaktivi kontraŭ la rutino, la inercio kaj la involuciaj tendencoj"), sed en-

[4]Sintezaj konsideroj pri la Iltisa skolo kaj la *Manifesto '87* troviĝas en Minnaja & Silfer (2015:601).

tute ĝi diras nenion novan, krom tio, ke la Skolo, kies plej signifaj verkoj publikiĝis/as ĉe la eldonejo Iltis, fidelas al la reguloj de la Fundamento, ke ĝi inspiriĝas en la artismo de la Budapeŝta Skolo, precipe de Kalocsay, kaj ke ĝi konscias ke nia lingvo bezonas por sia plua evoluo kaj nuanca riĉiĝo daŭran enkondukon de neologismoj kaj de parolturnoj por familiaraj, vulgaraj kaj slangaj esprimoj. Nu, kiu povus kontraŭi tiujn principojn? Tial la afero restis stagna per si; kiu volis legi la verkojn de Piĉ plu legos, kaj kiu estis naŭzita de la troaj personaj eksperimentoj eĉ pri plej ordinaraj vortoj forĵetos ilin post la dua paĝo. Tamen la eldonejo Iltis per sia Manifesto volis iel akapari la progresemulojn, kvazaŭ nur tiu eldonejo estus progresiga por la artaj bezonoj de la lingvo. Tiu artefarita divido inter "ni" (la progresemuloj, la artistoj, la responsaj esperantistoj kaj aŭtoroj) kaj "ili" (la partianoj de la hobia Esperanto, kultantoj al rudimenta lingvo, sensubstancaj kontraŭvoĉoj) detruis la kredindecon eĉ de la tute prikonsentindaj deklaroj de la Manifesto '87.

Tiun akaparon parte kontraŭis, parte volis kunpartopreni la Artliteratura Praga Skolo, konsistanta el Jiři Karen (1920–2000), Josef Rumler (1922–1999), Eli Urbanová (1922–2012), Čestmir Vidman (1921–2013). Ĝiaj celoj, plej bone prezentataj de Urbanová, fakte klonis tiujn jam esprimitajn en la Iltisa Manifesto.

La vizito de Haupenthal al Prago en somero 1988 povis esti, laŭ deziro de la praganoj, kunfluo de la praga skolo kun la iltisa; tion kaj RH kaj Piĉ rifuzis; siavice ankaŭ aliaj elstaraj esperantistoj, kiaj Gaston Waringhien, Bernard Golden kaj Reto Rossetti forte distanciĝis de Urbanová. Posta diskuto, kvankam ne senpasie ekvilibra laŭ la nombro de intervenoj favoraj al unu aŭ al la kontraŭa tezo, trovis detalan pritrakton en Urbanová k.a. (1989). Piĉ insiste ne volis, ke oni lin atribuu al la Praga Skolo, malgraŭ fortaj koincidoj: "Kaj nokfoje[5] mi insistas: mi ne estas pragano, nek literature, nek geografie, sed ja Iltis-skolano kaj litomiŝlano!" Kvankam ĉi tie ne estas la loko pritrakti la stilon kaj la lingvaĵon de Piĉ, se juĝi lian sukceson ĉe la publiko oportunas diri ke liaj verkoj aperis nur ĉe Iltis inter 1981 kaj 1999, neniam represitaj krom unu broŝureto atinginta duan eldonon; efektive lia stila avangardeco kaj ankaŭ lia temaro estis eble miskomprenitaj, sed certe rifuzitaj de la legantaro.[6]

Malmultaj estis tiuj kiuj aperte polemikis kun la Iltisa skolo; male tiuj kiuj titolis sin "iberoj" kaj startis per *Ibere libere* (1993) kaj *Ekstremoj* (1997) sin

[5] *Nokfoje* 'ankoraŭfoje' (Piĉ 1990:3).

[6] Al Piĉ estas dediĉitaj kvin plenaj paĝoj, plus aliaj resendoj, en Minnaja & Silfer (2015:441–446).

deklaris sekvantoj de Fernando de Diego kaj RH ilin konsideras daŭrigantoj de la Iltisa skolo.

5. Akademiano, pintoj kaj valoj, lumoj kaj ombroj

Kiel konate, la Akademio de Esperanto konsistas el 45 membroj kaj renovigas sin je triono, do 15 membroj, je ĉiu tria jaro. Por havi ĉiam 45 membrojn dividitajn laŭ tri egalnombraj trionoj, establiĝis la kutimo ke, se kreiĝis vakaj lokoj ankaŭ en la triono ne submetata al renovigo, kandidato kiu estas post la 15-a en la vico laŭ la ricevitaj voĉoj, estas enmetata en la trionon kie estas vaka loko, kaj do kun mandato finiĝonta ne ja post plenaj naŭ jaroj, sed ses aŭ nur tri. Por la elektoj de printempo 1973 Haupenthal, 28-jara, estis prezentita al akademianiĝo, sed ne ja de la estraro, kio estus doninta pli da ŝancoj de sukceso. Konkurencis 21 kandidatoj por 17 lokoj kaj RH ne estis elektita.

Tri jarojn poste, en 1976, Haupenthal estis denove kandidatigita, ĉi-foje de la estraro; konkurencis 25 kandidatoj por 19 lokoj. RH rezultiĝis 18-a, do elektita, sed kun mandato nur trijara. En la sekva baloto, en 1979, li estis konfirmita kiel 15-a en la vico, do elektita kun plena 9-jara mandato.

La sekvantaj elektoj estus devintaj okazi en 1982, sed pro internaj malfacilaĵoj ili estis prokrastitaj al 1983; la rekapto de la trijara ritmo okazis unu jaron pli malfrue, kaj la mandatfino de RH estis do prokrastita al 1989. Tiam li ree prezentiĝis kaj lia raporto pri la agado farita en la jarnaŭo (fakte jardeko) de sia mandato estis vere impona, ampleksante kvar plenajn paĝojn kaj duonon: 80 eldonaĵoj, 23 libroj, 33 ĉefaj artikoloj, do longdistance la plej produktiva el la elirantaj akademianoj. Interalie la Akademio estis aprezinta kun granda laŭdo la redakton de *Li kaj ni*, la festlibron por Waringhen aperintan en 1985, do li ŝajnis en plena sintonio kun la plimulto de la akademianoj. Malgraŭ tio, li klasiĝis lasta el la elektitoj, kaj sekve, refoje, kun nur trijara mandato, ĝis 1992. En sia vulkana agado, RH planis kompili *Leksikonon de nuntempaj verkistoj* kaj komunikis al la gekolegoj, ke, manke de normoj starigitaj de la Akademio (kio estus ĝia tasko), eldonejo Iltis starigos proprajn koncerne la unuecigon de ortografiaj normoj (majuskligo/minuskligo), bibliografiaj normoj, unuecigo de mallongigoj. Tiu anoncita agado sen konekso kun la Akademio komencis frostigi la rilatojn inter RH kaj la lingva institucio mem.

En 1992 RH estis 16-a en la klasifiko, tial al li estis provizita posteno kun 6-jara mandato, ĝis 1998. En 1995 li kandidatis por la posteno de sekretario, kontraŭ Perla Ari-Martinelli (intertempe fariĝinta la edzino de Giorgio Silfer)

sed malvenkis; samtempe Werner Bormann estis elektita prezidanto. Ĉilastan RH komencis ĉikani per tre ofendaj, mokaj kaj insultaj vortoj, eĉ kun insinuoj pri nekorekta financa administrado, direktante analogajn insultojn al la freŝe elektita sekretariino. Ĉio aperis en la cirkuleroj de la Akademio, tiel ke la atmosfero estis ege perturbita kaj la estraro decidis "malfermi enketon pri la agoj de kolego Haupenthal kontraŭaj al la statuto". Intertempe RH estis suspendita, jura procedo ne antaŭvidata en la statuto, tiel ke tiu suspendo estos nuligita de la posta estraro, sed tio forte taŭzis la akvojn de la Akademio. Malgraŭ la dumtempa suspendo, Haupenthal sin proponis kiel vicprezidanton; la estraro decidis pri prokrasto. Kreiĝis tiel tre maltrankvila situacio, ĝuste okaze de la elektoj de 1998, en kiuj Haupenthal estis denove kandidato; li malsukcesis, ne plu kandidatos kaj tiel finiĝis lia partopreno en la Akademio.

6. Ekster la ŝtormo, tamen ne ĉiam

Paralele kun la altaj kaj malaltaj tajdoj en la Akademio, kelkajn vortojn meritas la partopreno de Haupenthal konekse kun la "Hamburgaj eventoj" de 1974 kaj de la posta jardeko. Kun profesoro Ivo Lapenna (1909–1987) li havis rilaton apogan kiam en 1975 Lapenna brue forlasis UEA kaj kunkreis la Neŭtralan Esperanto-Movadon (NEM): fakte la unua proparolanto kaj diskoniganto de ties vidpunkto pri la okazaĵoj en Hamburgo estis ĝuste Haupenthal, kiu organizis konferencon en Saarbrücken, prelude al kio poste estos la NEM-konferencoj (Lapenna 1975). Tiu konferenco estis mokata de la ortodoksa UEA-revuo, kiel "burleskaĵo de Haupenthal" (Milojević 1975:123–124). RH havis tre respektan senton al la falinta giganto, kaj gardis altvaloran leteraron, kiu poste trovis vojon al publikigo (Reinhard Haupenthal 2001). En tiuj leteroj montriĝas, ke li tute ne havis la saman vidpunkton kiel Lapenna kiam ĉi lasta evoluigis sian kunlaboron ĉe la novfondita revuo *Horizonto*, kaj frosta silento inter ili daŭros de aŭgusto 1976 ĝis 1984, kiam la ŝanĝiĝo de la monda situacio kaj de la finiĝanta malvarma milito kuntrenos ŝanĝon ankaŭ en la dissplitita esperanto-movado. Tiam maturiĝis la ideo pri kunveno, kie Lapenna prelegu, sed la profesoro mortos nur kelkajn monatojn poste.

En marto 1999 Haupenthal transloĝiĝis kun la edzino al Provenco kaj ekde tiam vivis izolite en ekstercentra kampara domo, rikoltante ĉerizojn kaj aliajn fruktojn en sia parcelo. Sidejon li ankaŭ havis en Markgräflerland (Suda Badeno). Lia scienca kaj bibliografia agado pluis per konstanta esplorado, verkado, eldonado. En la lasta jardeko interlingvistiko kaj volapukologio allogis lin kiel ĉefa esplortemo; lia studado pri Johann Martin Schleyer

konkretiĝis en dekkelko da verkoj, la fluo de liaj publikaĵoj nombris kelkajn ĉiujare.

La kolektado de ĉiaj esperantaĵoj daŭris konstante, same kiel lia tre afabla disponeblo al transdono, fotokopiado de dokumentoj, korektado de manuskriptoj. Lia nomo estas presita en la dankopaĝo de la *Historio de la esperanta literaturo* de Minnaja kaj Silfer, verko konceptita kiam la unua el la du aŭtoroj estis direktoro de la akademia Sekcio pri Literaturo, kiun ankaŭ Haupenthal partoprenis. Ankaŭ la baldaŭ aperonta *Historio de la Akademio* abunde profitos je liaj dokumentoj.

La malsano sin anoncis antaŭ ne multaj jaroj; operacio en Freiburg meze de 2013 estis fleginta la esperon pri resaniĝo definitiva kaj efektive lia agemo en la posta periodo aspektis tiu de homo en la pleno de sia forto. Previde al ĉiuj okazoj li jam en 2007 kontraktis la transdonon de sia dokumenta materialo al la Bavara Ŝtata Biblioteko.

Sed neniu sanktulo estas sen makulo. Omaĝe al la latina maksimo *parce sepulto* ‘indulgu la mortinton’ ne oportunas ĉi tie pesi kioma estis la envolviĝo de RH en malnoblan kalumnian pamfleton kontraŭ s-ino Ari-Martinelli, nek la publikigon ĉe Iltis de alia broŝuro kontraŭ la samaj personoj, travestiita kvazaŭ satiro, eĉ kun malrespekto de la aŭtorrajtoj pri la desegno en la kovrilpaĝo. *Parce sepulto.*

Referencoj

La Esperantisto — Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto 1889–1895. 1988. Hildesheim; Zürich; Nov-Jorko, NY: Olms.

Haupenthal, Esther. 1995. *Bibliografio de la verkaro de Reinhard Haupenthal.* Saarbrücken: Iltis.

Haupenthal, Irmi; Haupenthal, Reinhard, red. 2011. *Instrui Dokumenti Organizi.* Bad Bellingen: Iltis.

Haupenthal, Reinhard, red. 1985. *Li kaj ni.* Antverpeno; La Laguna: tk⋆.

Haupenthal, Reinhard. 2001. Mia korespondo kun Ivo Lapenna. **En:** Minnaja, Carlo, red. *Eseoj memore al Ivo Lapenna.* `www.kehlet.com` .

Haupenthal, Reinhard. 2010. *ILTIS. Ein Verlag, seine Geschichte, seine Werke. Eldonejo, ĝia historio, ĝiaj verkoj.* Bad Bellingen: Iltis. ISBN 978-3-932807-83-1.

Krause, Erich-Dieter. 1993. *Wörterbuch Deutsch-Esperanto.* Lepsiko: Langenscheidt.

Lapenna, Ivo. 1975. *Hamburgo en retrospektivo. Dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA.* Saarbrücken: Sarlanda Esperanto-Ligo.

Le Puil, Jacques; Danvy, Jean-Pierre k.a. 1992. *Grand Dictionnaire Français Espéranto.* Parizo: France-Espéranto.

Milojević, Simo. 1975. Danĝera ludo en Sarlando. *Esperanto* 68, 835/836 (7/8).

Minnaja, Carlo; Silfer, Giorgio. 2015. *Historio de la esperanta literaturo.* La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.

Piĉ, Karolo. 1990. *Urbi et orbi. Repliko al Giorgio Silfer.* Saarbrücken: Iltis.

Piĉ, Karolo. 1995. *La interna vivo de Esperanto.* Saarbrücken: Iltis.

Plukoj dum sencelaj promenoj. 2016. Germana liriko tradukita de Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Iltis.

Zeilinger, Michael. 1968. *Kiel (mal)venkigi Esperanton?.* Pleasecastle (t.e. Blieskastel): Iltis.

Urbanová, Eli; Silfer, Giorgio k. a. 1989. *Debato pri la "Praga Skolo".* La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.

Carlo Minnaja, doktoro pri matematikaj sciencoj (Univ. Pisa, 1963), postdoktoraj studoj ĉe Scuola Normale Superiore (Pisa, 1963–1965), magistro pri historio (Università Ca' Foscari, Venecio, 2006), profesoro pri diversaj matematikaj fakoj ĉe la itala Ŝipa Akademio, Universitatoj de Pisa kaj de Trento, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, gastprofesoro ĉe Virginia Polytechnic Institute (Usono, 1983–1984), honorprofesoro ĉe la Universitato de Sibiu, premio de la kulturo de la itala ĉefministro (1990), aŭtoro de cento da sciencaj publikaĵoj. Denaska esperantisto, en TEJO li estis vicprezidanto (1961–1963) kaj ĝenerala sekretario (1963–1966); komitatano de UEA, prezidanto de la Itala Esperantista Junularo, direktoro de la Itala Esperanto-Instituto (1967–1977); membro de la literatura rondo "La Patrolo" (1969–1979), membro de la Akademio de Esperanto ekde 1973, estro de ĝia komisiono pri historio. Aŭtoro de pli ol 1 400-paĝa vortaro itala-esperanta (CoEdEs, 1996), de la itallingva *L'esperanto in Italia* (2007), konstanta kunlaboranto ĉe pluraj revuoj (ĉe *Literatura Foiro* ekde ĝia fondiĝo en 1970 kaj ĉefredaktoro en 2014), liajn multajn tradukojn el italaj kaj italdialektaj aŭtoroj publikigis diversaj eldonejoj. Ĉefaj verkoj estas la traduko de *La Princo* de Machiavelli (serio Oriento-Okcidento), la redakto de *Enlumas min senlimo* (antologio el la itala poezio de la dudeka jarcento), de *Eseoj memore al Ivo Lapenna* kaj de pluraj antologioj el aŭtoroj de diversaj italaj regionoj. Li kompilis antologion de Zamenhof en la itala kaj italigis verkojn el esperanto-aŭtoroj. Kun Giorgio Silfer li publikigis la verkon *Historio de la esperanta literaturo* (2015).

Paperpoŝta adreso de la aŭtoro: Via Cavalletto 6, IT-35122 Padova
Retpoŝta adreso: ⟨carlo.minnaja@gmail.com⟩

Ricevita 2016-12-25
Akceptita por publikigo 2017-01-08

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 69–70

Zbigniew Galor — esperantista sociologo (1952–2017)

Jukka Pietiläinen

La konata esperantista sociologo Zbigniew Galor forpasis la 27-an de januaro 2017 en Poznano (pole Poznań). Li naskiĝis la 16-an de julio 1952 en Szczecin [ŝĉeĉin] en nord-okcidenta Pollando. Mi havis eblecon koni lin dum pluraj jaroj, kaj ni kune planis kaj realigis sociologian esploron inter la kongresanoj de la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009 — post la kongreso eĉ pli da personoj respondis al nia enketilo. La rezultoj aperis en la libro *UEA en konscio de esperantistoj* (2015), kiun ni kune verkis. Zbigniew, ankaŭ konata kiel Zbyszek, estis unu el malmultaj esperantistaj fakuloj en sociaj sciencoj kiuj havis profesiajn kvalifikojn kaj estis rekonata ankaŭ ekster esperantistaj rondoj.

Zbigniew Galor estis habiliĝinta doktoro pri sociologio kaj laboris kiel profesoro kaj estro de la katedro pri ĝenerala sociologio en la Universitato de Szczecin. Li lernis esperanton en 1968. Jam en siaj studentaj jaroj li fondis la unuan sciencan studentan rondon pri esperanto ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań.

Li magistriĝis pri sociologio ĉe UAM en 1976 kaj doktoriĝis ĉe la universitato Maria Curie-Skłodowska en Lublin en la jaro 1988. Lia doktora disertaĵo temis pri kooperativa posedo kiel ekonomia kaj sociologia kategorio. Zbigniew habitiliĝis ĉe UAM en Poznań en 2006; lia disertaĵo temis pri neformala ekonomio kiel socia fenomeno. Por tio li uzis la koncepton lumpenposedaĵo (*Lumpenwłasność*), per kiu li celis posedaĵon kaj enspezojn kiuj ekzistas ekster la formala, ekzemple impostata, ekonomia sistemo.

Lia sociologia laboro estas publikigita plejparte en la pola lingvo, kaj li esploris aparte marĝenulojn, malriĉulojn, migrantojn, turismon, kaj, pli ĝenerale, la socian strukturon kaj socian ŝanĝiĝon en Pollando de socialismo al kapitalismo. Ankaŭ esperanto estis ofte inter liaj esplortemoj, kaj li ankaŭ verkis plurajn sciencajn artikolojn en esperanto. En la angla lingvo aperis nur kelkaj tekstoj, plejparte en konferencaj kolektoj, sed li kontribuis ankaŭ al la renoma *Routledge Handbook of World-Systems Analysis* per artikolo pri

lumpen-ekonomio kiel alia flanko de tutmonda ekonomio. En la pola lingvo li publikigis ĉe renomaj sociologiaj revuoj kiel *Studia Socjologiczne*.

Li prelegis pri sociologio de esperanto kaj pri esperanta kulturo en la *Interlingvistikaj Studoj* ĉe UAM; krome li partoprenis plurfoje esperantologiajn konferencojn kaj verkis plurajn sciencajn artikolojn en esperanto. Ankaŭ en esperanto li fokusigis atenton al la esperanto-komunumo kiel marĝenula fenomeno kaj esploris la esperanto-komunumon kiel sociologian fenomenon. La enketo dum la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009 okazis pro lia iniciato, kaj por kompilado de libroforma sociologia analizo de esperanto kaj esperantistoj estis origine planata granda aro da esploristoj — tamen fine restis nur li kaj mi, kiuj kompilis libron, kiun eldonis KAVA-PECH kaj financis Esperantic Studies Foundation. Vere internacia esperanta projekto.

Zbigniew volis antaŭenigi kunlaboron inter esperantistaj sociologoj kaj soci-sciencistoj kaj profesian sociologian esploradon de esperanto, kaj tiucele li iniciatis fondon de la Sociscienca Esplor-Grupo, kiu kunvenis dum kelkaj universalaj kongresoj.

Li ankaŭ verkis poemojn kaj tradukis polajn kanzonojn en esperanton kaj kontribuis al pluraj esperanto-revuoj kiel ekzemple *La Ondo de Esperanto* kaj *Pola Esperantisto*, kaj aktivis en organizado de la kultura festivalo *Arkones*. Lia edzino estis profesoro Ilona Koutny.

La listo de publikaĵoj de Zbigniew kaj ankaŭ kelkaj tekstoj en esperanto kaj en la pola troveblas ĉe la adreso
`http://www.zbigniewgalor.pl/?file=esperanto#publikajoj` .

Jukka Pietiläinen estas docento ĉe Helsinka universitato kaj esploras pri amasmedioj, internacia komunikado, sociologio kaj sociolingvistiko.

Paperpoŝta adreso de la verkinto: Poŝtkesto 42, FI-00014 University of Helsinki, Helsinki
Retpoŝta adreso: `jukka.pietilainen@helsinki.fi`

Ricevita 2017-06-21
Akceptita por publikigo 2017-06-30